XXVII-a Jaro. — N° 373-374 (9/10). Monata Septembro-Oktobro 1931.

ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER. Redaktoro : D-ro Edmond PRIVAT. Direktoro de UEA : Hans JAKOB.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio : 1, Rue de la Tour de l'Ile, Genève.

ENHAVO : Unueco en diverseco, de Edmond Privat (125). — 23-a Universala Kongreso de Esperanto, impresoj de novebakita Esperantisto (126). — La profitoj de l'industrio (132). — Lord Irwin pri Hindujo (133). — Profesoro Wladimir Koeppen (134). — Tra la Mondo Esperantista : Antaŭkongreso en Breslau (134). — Fakaj Kunvenoj : Studentoj (134). TEKA (135). — Skolta Ligo (134). — Kontraŭmilita movado (134). — Stenografoj (135). — Zamenhof-Monumento, soleno en Bialystok (135). — Oni dankas (135). — Solena malfermo de l'Esperanto-domo en Arnhem (136). — Esperantista vivo (136). — Niaj mortintoj (136). — Du jaroj sub la verda stelo (138). — Premio pri plej bona tutmonda lernolibro de integra eduko (136). — Internacia Polica Ligo (138). — Reklamo : Korespondado : Petoj kaj Proponoj (139). — Aldonoj : Oficiala Informilo de UEA, n-ro 12. — Bulteno de l'Internacia Labora Oficejo, N-ro 43. —

Unueco en diverseco

En sia sopiro al unueco la homaro kreskigis plurajn movadojn posedantajn internacian karakteron. Sufiĉas pensi pri la vasta Katolika Eklezio aŭ pri la tutmondaj laboristaj partioj.

En la nuna epoko ankaŭ esperantismo reprezentas novan emon al unueco. Memkompreneble aliaj internaciaj organizoj, ĉu katolikaj, ĉu klasbatalaj, uzas Esperanton por faciligi sian taskon, sed la helpa lingvo mem kreis ĉirkaŭ si neŭtralan atmosferon kun aparta karaktero.

Ĝi estas ne la sama kiel komuneco de kredo aŭ klaskonscio. La internaciismo de laboristaro naskiĝis el kunbatalo pri vivkondiĉoj. Esperantismo naskiĝis el simpatio kaj scivolemo pri la nacia vivo de la ceteraj popoloj, ĉefe la malgrandaj.

Ĝi entenas la plezuron ilin ekkoni kaj ilin trovi amindaj, ankaŭ la ĝojon siavice malkovri al ili la valorojn de propra patrujo kaj kontentecon pri ilia interesiĝo al ĝi.

El tio devenas amikeco bonhumora kaj la sento pri morala unueco. Angloj, Francoj, Germanoj, Ĉinoj, Poloj kaj Japanoj estas fine homoj kun similaj zorgoj. Kune oni deziras vivi en paca rondo familia.

Ĉiu movado kreskigas en la mondo ian kutimon. Kion Esperanto karakterize disvastigas, tio estas la fidema egaleco kaj federaciema unueco : ĉiuj nacioj sur komuna bazo, neniu trudante sian lingvon al la ceteraj, sed ĉiuj kulturante ĝin interne de siaj landlimoj.

Ekvivanta fido je unueco en diverseco, homaro ekkonscia pri si mem, sed fidela al naciaj valoroj, plenaj je ĉarmo kaj koloro, jen tio, kio donis al Esperanto flugilojn kaj karakteron. Ke ĝi kreskigis la esprimon de tiu ekanimo, serĉante esprimilon, jen la esence propra sperto de Esperanto. Cetere, sen ia mistiko vere sia, la lingvo neniam estus fariĝinta vivanta ilo, per kiu parolanto povas entuziasmigi aŭdantaron kaj elvoki ties ridon aŭ kortuŝon.

Kiu vizitis esperantistajn kongresojn, tiu scias kian rolon ludas en ĝi la intereso pri naciaj kutimoj aŭ kostumoj. La ĉefa esperantista tradicio kuŝas en tiu simpatia scivolemo pri ceteraj nacioj, kaj oni komprenas facile kial instruado de Esperanto en lernejoj havis kiel unuan rezultaton « doni animon al geografio », kiel konstatis eduka inspektoro.

Kiom malproksime tia spirito blovas de la detruema unuformeco kaj de la malĝustaj antaŭjuĝoj de neinformitaj homoj, ankoraŭ suspektantaj Esperanton, ke ĝi volas « anstataŭi la naciajn lingvojn » !

Male, se oni devus fari ian riproĉon al esperantismo, tiam oni povus kontraŭe konstati ĝian timemon sur la internacia kampo. Kiel ĉiuj sentoj, ankaŭ la « interna ideo » de la esperantistoj devos progresi pli antaŭen.

Estas jam utile kaj bone interesiĝi je ceteraj nacioj kaj ilin ekami, sed tio ne sufiĉas. Kion la mondo bezonas urĝe, tio estas ne nur ekkonscio pri la unueco de la homaro, sed tiel fortan konsciencon tiurilatan, ke ni kapablu ĝin memori eĉ kiam la bezonoj de l'aliaj popoloj kontraŭstaras la blindajn interesojn de nia ŝtato.

Ĝis nun neniu internacia movado, ĉu religia, ĉu klasa, montris absolutan venkon de tia sento super la nacia. Do ankaŭ ne de esperantismo ni ĝin postulu tuj. Tamen iom post iom la lingvo de la granda homarano Zamenhof ankaŭ disvastigos tiun kutimon juĝi sin mem kaj konsideri ceterajn popolojn ne nur scivoleme, sed helpeme, interkonsenteme kaj eĉ ofereme. Al societo de ŝtatoj ĝi estas same necesa kiel al societo de homoj.

Edmond PRIVAT.

23-a Universala Kongreso de Esperanto, Krakow

1 - 8 Aŭgusto 1931

Impresoj de novebakita Esperantisto

Konfidenca antaŭparolo.

Kiel amatora fuŝisto mi raportis antaŭ du jaroj pri la 21-a Universala Kongreso de Esperanto. Nun la redaktoro de « *Esperanto* » denove petis min verki tian raporton pri la 23-a.

Mi volonte promesis, sed.....

Sed intertempe mi jam fariĝis sperta fuŝisto. Mi bone pasigis la Kongreson, amindumante ĉiulandajn Esperantistinojn, kolektante subskribojn de la kongresanoj en mian kongresan libron, promenante, dancante, kantante.

La oficialajn laborkunsidojn, fakajn kunvenojn kaj aliajn tedajojn mi pro manko de tempo ne povis ĉeesti. Cetere tio estas okupo por tute novaj aŭ por tuttute malnovaj Esperantistoj.

Tial mi ankaŭ malesperis ne havi la eblecon plenumi mian promeson verki la raporton.

Sed lastminute mi renkontis junulon – freŝbakitan Esperantiston, verde vestitan de kapo ĝis la pinto de liaj ŝuoj kun Esperantaj insignoj en la kravato, butontruo, sur ĉiuj poŝoj, pantalonoj kaj laŭdire eĉ sur aliaj nevideblaj partoj de lia vestajaro.

Lin finbakis vendrede, unu tagon antaŭ la Kongreso aminda pastro Ĉe, la fama Esperanta grandfabrikisto, produktanta amase novajn Esperantistojn.

Mi renkontis tiun novan fervorulon kiam li, preskaŭ plorante, sensukcese konvinkigis la redaktoron de Kongresa Bulteno, ke li akceptu lian artikolegon pri faka kunveno de Esperantistaj lakt-trinkemuloj.

Jen feliĉo! – ekpensis mi. Tiu sinjoreto savos min.

Tuj mi faris al li ruzan proponon. Li skribu la raporton, mi ĝin subskribos, por ke ĝi povu esti enpresota. La plej freŝa Esperantisto kun larmoj en okuloj de la verde radianta vizaĝo konsentis kaj korege min dankis.

Post dudekkvar horoj li alportis al mi en grandega kofro sian raporton. Ĝi pezis aron da kilogramoj kaj enhavis ĉiujn detalojn, detaletojn, detalegojn.

Kun vera ĝojo pro la bone sukcesinta afero, mi nun ekspedas la kofron kun la manuskripto al Ĝenevo. Mi tre rapidas, ĉar la kongresa poŝtoficejo baldaŭ jam fermiĝas, por ĉiam.

Mi esperas, ke la redaktoro ne rimarkos la fuŝon kaj ŝanĝon. Ĉio do estos bona. Mi eĉ havos neatenditan profiton, pro la multepeza raporto, ĉar mi ja ricevas honorarion por ĉiu linio.

Nur bonvolu bone konservi la ĵus al vi konfiditan konfidencan informon pri la vera aŭtoro. La redaktoro neniel rajtas tion ekscii.

(Joŝo)

Noto de la redakcio.

Ni presigas ĉi-sube ekstrakton el centkilometrolonga raportego, ĵus ricevita el Krakovo kun la oficiala poŝtŝtampilo kongresa. Ĉar UEA bedaŭrinde ankoraŭ ne atingis la sopiratan minimuman nombron de 10.000 membroj ĝi ne havas la monon presigi tiom grandan raporton.

La originalon de la raportego ni emas transsendi al la Internacia Esperanto-Muzeo, kolektanta fervore ĉion en, pri, pro. sur, sub, kun kaj sen Esperanto.

Solena malfermo.

Fine do efektiviĝis mia revo. Mi, plej juna, plej freŝbakita Esperantisto havas la grandan honoron ĉeesti la malfermon de Universala Kongreso de Esperanto.

Mi sidas en dudekkvina vico en la salono inter plej respektindaj eminentuloj de la movado. Mia najbaro de la dekstra flanko rakontas al mi, ke li estas fama Esperantisto en la vilaĝdistrikto Truego en lando, kies nomon mi forgesis. La najbarino de maldekstra flanko ankaŭ sindoneme laboras por Esperanto inter surdmutaj kontraŭuloj de virinoj. Ankaŭ ĉiuj ceteraj sinjorinoj kaj sinjoroj en la salono estas ĉiuj senescepte bonegaj Esperantistoj, fervoraj verdstelanoj kaj perfektaj propagandistoj. Tion mi tuj unuavide konstatis jam laŭ tio, ke ĉiu el ili havas insignon Esperantistan kaj kelkaj eĉ manĝas Esperanto-ĉokoladon.

Jen ĉio eksilentiĝas. La malferma kunsido komenciĝas.

Eksonas bela melodio de ia Esperanto-kanto, kiun mi kiel nova Esperantisto ankoraŭ ne konas, pri kio mi tre hontas. Estas ja devo de ĉiu Esperantisto tralegi kaj parkere scii ĉion, kio ĝis nun aperis en nia lingvo.

S-ro Long malfermas la kunsidon, kiel prezidinto de antaŭa kongreso kaj transdonas la prezidon al prof. D-ro Bujvid, kiu en belaj vortoj alparolis la diverslandan, diversnacian kaj diversreligian, sed unulingvan multnombran ĉeestantaron.

Poste parolis la prezidanto de la Internacia Centra Komitato, S-ro Merchant, kiun mi aŭskultis kun malfermita buŝo tre atente. Ĝenerale mi ĉiujn paroladojn de la gvidantoj aŭskultis tre atenteme, kvankam mia najbaro, tiu el la vilaĝo Truego, diris al mi, ke tiuj, kiuj sidas sur la estrado kaj estras la Esperantistaron ne estas tiel gravaj por la movado, kiel li.

Poste parolis treege favore la reprezentantoj de la registaro, de la urbestraro, de registaro de aliaj landoj kaj diversaj aŭtoritatuloj. Parolis ankaŭ delegitoj de la Esperantistaro de landoj reprezentitaj.

Ĉiun vorton, eldiritan tie supre, en la sanktejo, zorge notis la direktoro de I.C.K., kiu havas tre larĝajn ŝultrojn, sur kiuj – kiel klarigis oficiale s-ro prezidanto Merchant – kuŝas la tuta Esperanto-movado. Kiel al mi rakontis spertaj Esperantistoj, tiuj ŝultroj plilarĝiĝas ĉiujare, ĝuste pro la daŭra kresko de la movado.

Fine ni kantis ĉiuj la belegan himnon de « Espero ». Ĉiuj kune. Veraj filoj de l'tuta homaro.

Esperanta Krakovo.

Poste ni eliris ĉiuj urbon, kie policanoj portantaj nian verdan stelon, afable donadis al ni diversajn informojn kaj klarigadis ĉion en Esperanto. Ili arestis neniun el ni. Verŝajne la Esperantaj policanoj estas aliaj, ol ĉiuj aliaj iliaj kolegoj.

Sed ne nur la policanoj en Krakovo estas Esperantistaj. Ankaŭ la tramkonduktoroj, poŝtoficistoj, vendistoj kaj vendistinoj en la butikoj, eĉ kelneroj – ĉiuj parolas Esperanton!

En unu restoracio, havanta tre belan nomon « *Sub la anĝeletoj* » oni tiel estimis la Esperantistojn, ke ĉe eniro de verdstela gasto ĉiuj kelneroj kun la posedanto stariĝadis strabe en unu vicon militistmaniere kaj ekkriadis laŭtvoĉe : « *Bonan tagon* ».

Sur la stratoj flirtis verdaj standardoj, ĝojigante mian junan Esperantistan koron. Ha, se en ĉiuj urboj kaj urbetoj de la mondo baldaŭ jam ĉie kaj ĉiam flirtus Esperantaj flagoj.

Kiam tio fine okazos ?

Interkonatiga vespero.

Vespere en la Malnova Teatro okazis la interkonatiga vespero. Laŭ postulo de l'esp. aŭtoritatoj ĉiu kongresano estis devigita dum unu vespero interkonatiĝi kun ĉiuj ceteraj. Afero ne tre facila, tamen mi penis ĝin nepre plenumi por montri, ke mi estas kvankam nova, sed tamen jam aŭ ankoraŭ, (mi ne scias ankoraŭ bone, kiun el ambaŭ esprimoj mi uzu) fidela Esperantisto.

Dua kongrestago.

La duan tagon matene okazis diservoj kun predikoj en nia lingvo.

Poste oni kolektiĝis apud la monumento de Mickiewicz kaj komune marŝis al la strato « Niecala » (Netuta).

Tie okazis soleno de alinomigo de tiu strato je « Zamenhofa ». Denun do tiu Netuta strato estos jam tuta Zamenhofa.

Dum la solenaĵo okazis paroladoj de la urbestro , prof. Bujvid kaj de du fotografistoj. Tiuj lastaj dum la parolado de la urbestro kuregis al balkono por povi fotografi kaj laŭte mem ekinterparolis, malpaciĝinte pro tio, kiu el ili havas pli da rajto fotografi la honorindan personon. Unu ekkriis : Mi estas profesia fotografisto, do mi devas la unua fotografi.

Sed la dua ekkoleris : « Mi estas longjara propagandisto de Esperanto, do mi devas nepre la unua tion fari por povi forsendi per radio la bildon tuj al mia konatulino en Bombajo por sia kolekto ».

Iu eminentulo de malsupre furioze svingis per la manoj kaj tuj poste – kiam tio ne helpis – ekkriis energie « Eksilentu vi ambaŭ ».

Intertempe la urbestro finis la paroladon kaj ambaŭ malpacemuloj sur la balkono restis sen la dezirita fotografaĵo.

Post la tagmanĝo, kiu konforme al oficiala programo, estis permesata por konsumo nur inter la unua kaj dua horo posttagmeze, okazis bela ekskurso al la arbaro Wola.

Tie estis aranĝota oratora konkurso. Sed ĉar la oratoroj ne havis ankoraŭ sufiĉe disligitajn langojn, oni unue trinkis bieron kaj aliajn fluidaĵojn, bone efikantajn dum varmega tago.

Intertempe samideano Werner el Dancigo dancigis eĉ plej maljunajn Esperantistojn. Li organizis belajn komunajn infandancojn kaj ludojn. La Esperantistoj tre volonte partoprenis ilin kaj multe ĝojis. Nur unu sinjoro, ne tro maldika, dum ia kurludo, decide deklaris, ke li estas « principa malkuranto » kaj tial ne povas partopreni. Cetere mi poste eksciis, ke li efektive ne emas kuri, ĉar li nur flugas. Li estas oficiro de flugarmeo.

Fine post kelkaj horoj, kiam oni satbabilis kaj ludis ĝis laciĝo, ekkomencis la Oratora Konkurso. Oni parolis pri ĉiuj kaj ĉio : sinjoro Morariu pri infanoj, s-ro Dahl pri la fama azeno, kiun li ŝtelis el la fabelo de pastro Ĉe, s-ro Neuzil pri kisado (laŭdire li estas spertulo), s-ro Dratwer pri milito (li estas generalo ĉe la varsoviaj studentoj-Esperantistoj), s-ro Scherer pri sia esperantistiĝo.

La lasta estis pastro Font Giralt, kiu faris bonegan impreson pro sia impona amplekso, tondra voĉo, bluaj okulvitroj kaj milda rideto.

Postkiam ĉiuj parolintoj jam estis tute raŭkaj kaj la ĉeestantoj tute surdaj, sinjoro Leo Turno turnis ĉies atenton je la rezulto de la konkurso. Unuan premion akiris pastro Font Giralt.

Malgaja vespero.

Vespere okazis malgaja vespero en la Malnova Teatro. En la kongreslibro pro preseraro estis notita « Gaja vespero ».

Ĝi estis organizita jene : Sur scenejo iu sinjoro en pola lingvo ion parolis, senĉese, senfine. En la salono sidis duone Esperantistoj, duone simplaj krakovaj mortuloj.

La Esperantistoj montris multe da pacienco kaj obeemo al la kongreskomitato, aŭskultante dum horoj nekonatan lingvon. Ili estis senfine malgajaj pro tio, ke la obstina restparto de la krakova loĝantaro ne posedas ankoraŭ Esperanton. Kontraŭe la krakovanoj estis tre gajaj kaj multe ridis la tutan vesperon, verŝajne pro tio, ke la unuan fojon en la Esperanta historio, la verdstelanoj nenion komprenas, malgraŭ ke ili ĉiam fieras pro sia interkomprenebligo.

Sed estis momento, kiam la kongresanoj, revenĝis sin kaj ekgajiĝis. Tio estis ĉe fino de la vespero, kiam oni permesis jam foriri.

Unua laborkunsido.

Sekvantan tagon okazis unua laborkunsido de la Kongreso.

Sinjoro direktoro raportis pri la agado de I.C.K., post kio la raporto estis akceptita. La prezidanto s-ro Merchant tiel ekĝojis pro tio, ke li deklaris, ke la I.C.K., kiu laboris nur tage, denun laboros ankaŭ dumnokte.

Sekvis paroladoj pri filmo, muzeo kaj aliaj belaj aĵoj. Decidoj ne estis faritaj, sed ĉion notis la sekretario por ke ĝi nepre eniru la protokolon kaj ĉiu parolinto povu vidi sian nomon en la oficiala raporto.

Fakaj kunvenoj kaj Somera Universitato.

La saman tagon okazis fakkunvenoj kaj prelegoj en Somera Universitato. Mi multe malĝojis, ke mi ne povis samtempe ĉeesti ĉiujn aranĝojn, kio ja estus devo de vere bona kaj pia Esperantisto.

Vespere mi aŭdis belan koncerton, aranĝitan por la kongresanoj. La belaj kantoj estis multege aplaŭditaj. La aplaŭdoj estis disaŭdigitaj tra la tuta mondo per radio.

Kunveno de Universala Esperanto-Asocio.

Tre interesis min la kunveno de UEA, kiu estis plenŝtopita. Mi jam estis preskaŭ trovinta etan koketon sur ies genuoj, ankoraŭ liberan, sed mi ekaŭdis, ke rajtas ĉeesti nur tiuj, kiuj pagis la kotizon. Mi do kun peza koro forlasis la salonon, ĉar bedaŭrinde mi forgesis aliĝi.

Tamen mi nepre aliĝos baldaŭ post la Kongreso al UEA, kiu faras ja diversflankajn kaj mirindajn servojn. Forirante de la salono mi ankoraŭ sukcesis ekaŭdi pri tute nova servo de UEA : la ventumila servo. Ĝin inaŭguris la direktoro de UEA mem, propramane ventumante unu el niaj vicdelegitinoj dum la koncerta vespero.

Kunsidoj, kunsidoj, kunsidoj.

Sekvantan tagon, merkrede, ree okazis laborkunsido de la Kongreso, fakkunsidoj de diversaj anoj kaj uloj kaj privataj kunsidoj en la apartaj ĉambroj de la Kongresejo, en kafejoj kaj aliaj lokoj. En unu kafejo mi kaptis maloftan birdon : Laŭ la manĝokarto tie estis ricevebla « malblanka kafo ». Tamen mi ĝin ne trinkis, ĉar mi estas fundamentano.

Vespere estis belega festo de pola muziko sur la historia korto de Vavelo. Ĝi faris je ĉiuj neforgeseblan impreson.

Akvotrinkado por bono de Esperanto.

Jaŭde matene Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio havis sian fakkunvenon. Mi ne estas kuracisto, sed estas ja honora devo de ĉiu vera Experantisto viziti ĉiujn kunvenojn por progresigi nian karan lingvon. Mi do, kiel juna, plej juna, plej freŝa verdstelano, venis al la kunveno kaj deziris fervore partopreni.

Bedaŭrinde, la temoj estis severe sciencaj. Oni parolis nur pri diversaj malsanoj kaj tute ne pritraktis la aferojn de ĝenerala propagando kaj de tuja enkonduko de Esperanto ĉien. Tial mi nur povis partopreni per aŭskultado kaj per trinkado de mineralaj akvoj, kiujn disponigis al la kunvenanoj senpage certa fabriko. Por ke tiu fabriko sciu, ke estas multaj Esperantistoj – akvemuloj kaj ke valoras tial uzi Esperanton por ĝiaj komercaj rilatoj, mi dum la tuta kunveno seninterrompe trinkis la akvojn acidajn, dolĉajn, diverskolorajn, diversgustajn, diversefikajn. Ĉe la fino de la kunveno mi estis peza kiel eminentulo, la kapo balanciĝis tien kaj reen, en la stomako regis plena revolucio. Stato ne tro agrabla, sed por bono de la Esperanta afero ĉio estas farinda.

Literatura Mateno.

De tiu kunveno mi peniris (pro la akvaro) al la Literatura Mateno.

La ejo de kinematografo, kie ĝi okazis, estis plenplena. Samideanoj kaj samideaninoj ĝoje kaj vigle interparoladis per lingvo kaj stilo nepre literatura.

La programo de la Literatura Mateno estis tre riĉa kaj interesa. Jean Forge, Lidja Zamenhof, Baghy, vera, viva Baghy, Teo Jung kaj aliaj niaj literaturaj eminentuloj regalis la samideanaron abunde per belaĵoj de niaj poeziokaj prozo.

Tre kortuŝiga por mi estis la momento, kiam parolis la rumana samideano Morariu, kaj lia edzino, sveda samideanino s-ino Morariu fervore aplaŭdis sian edzon. Jen vera ekzemplo de bona Esperantista paro! Ili ne trovas alian komunan lingvon krom Esperanto kaj ili estas tiom fundamentofidelaj, ke unu al alia diras nur « vi ». Esperantisteco, ĝentileco, interfratiĝo de du nacioj, malgranda (dume) rondo familia. Modela verda paro!

Ĉe fino de la mateno parolis pastro Ĉe. Li admonis ĉiujn, ke oni ne nur uzu Esperanton por komerco, sed ankaŭ serĉu travivaĵojn en tiu lingvo kaj amu en Esperanto.

Julio Baghy — Jean Forge

Tuj mi elpoŝigis mian grandan notlibron kaj zorge enskribis la instruon de tiu, kiu min bakis : « Bona Esperantisto devas ami nur en Esperanto, per Esperanto kaj por Esperanto ».

Tion mi nepre efektivigos.

Frenezuloj ne estas tiom frenezaj.

Posttagmeze mi denove partoprenis aranĝon de T.E.K.A. : la ekskurson al granda frenezulejo en Kobierzyn apud Krakovo.

Du grandegaj aŭtobusoj kondukis nin tien.

Kiam ni alvenis, mirego kaj samtempe ĝojego ekregis min : la enirpordo de la frenezulejo, apartiganta ĝin de la ekstera mondo, estis bele ornamita per blankverdaj flagetoj je nia honoro. Do, ankaŭ en la frenezulejon penetris Esperanto. Kia sukceso: kia grandega propaganda sukceso!

La afabla ĉefkuracisto kaj liaj helpantoj-kuracistoj gvidis nin tra ĉiuj fakoj, donante necesajn klarigojn. Ni vizitis senescepte ĉion : la duonfrenezulojn, tutfrenezulojn, trankvilulojn, furiozulojn ktp.

Ĉiu speco de frenezuloj troviĝas en aparta belega parko kaj estas la tutan tagon tie, promenante kaj kompreneble kantante, kriante, unuvorte ĝaunte plenan liberecon.

Mi vere enviis tiujn homojn. Ĉu ne estus bone, se tiaj belegaj parkoj estus faratj por niaj samideanoj, kiuj ja plejparte estas urbanoj kaj neniam eĉ vidas verdaĵon (krom la Esp. stelo kaj aliaĵoj) ?

Mi informiĝis ĉe frenezuloj, ĉu iu el ili scipovas Esperanton. Ili respondis, ke « tiom frenezaj » ili ankoraŭ ne estas.

Ĝenerale, la frenezulejo tre plaĉis al mi. Nur unu samideano-kuracisto estis malkontenta kaj diris :

– Tamen mi preferas resti Esperantisto, ol esti enloĝanto tie-ĉi!

Balo sukcesis, mi malsukcesis.

Estis jam sufiĉe malfrue, kiam ni revenis de la vizito, farita al la frenezulejo. Mi devis rapidegi por veni ĝustahore al la balo internacia, kiu ja estas unu el la plej bonaj propagandiloj por Esperanto.

Mi kuregis hejmen, ŝanĝis la vestaron, sukcesis duonrazi min, oferante mian sangon por nia sankta afero, kaj – jen mi jam ĉeestas la balon.

Belega bildo !

Knabinoj en diversaj interesaj, multkoloraj kaj plaĉaj naciaj kostumoj ravigis ĉies okulojn kaj korojn.

Muziko bele ludis, paroj dancis, japano valsis kun altkreska norda fraŭlino, polo premis en pasia tango tremantan italinon, hispano ŝimiis (kamarado kompostisto, ne forgesu la supersignon!) kun anglino – la tuta mondo ĝojis pro la efektiviĝo de la bela revo pri « granda rondo familia ».

Ankaŭ mi volis nepre partopreni, des pli ke mi ja memoris pri la matena instruo de pastro Ĉe pri serĉado de travivaĵoj kaj amo en Esperanto.

Mi do ekis serĉi por mi objekton de travivotaĵoj. Sed ĉiuj jam estis okupitaj.

Fine mi trovis unu, kiu dum la vizito en la frenezulejo promesis al mi solene la unuan dancon. Ŝi ĵus liberiĝis el ies brakoj post la dancado kaj eksidis ĉe la muro.

Mi alkuris al ŝi kaj riproĉis pro la neplenumo de ŝia promeso.

– Jes – diris ŝi – sed vi malfruis kaj nun mi ne volas.

– Sed, fraŭlino, respondis mi kun ploro en la voĉo, pro vi mi ja ĝuste malfruis, forŝirante mian haŭton dum la razado, kaj nun pro via malkonsento mi ne povos plenumi la instruon de pastro Ĉe.

Kaj elpoŝiginte mian notlibron mi citis al ŝi, kion mi aŭdis dum « Literatura Mateno » pri la devoj de vera Esperantisto.

– Aha – ŝi diris, ridetante – tion mi ne sciis, ĉar mi ne ĉeestis la matenon. Do, bone! Atendu iom en la angulo kaj poste ni vidos.

Mi atendis obeeme, sed nenion vidis. Ĉar ... ŝi malaperis.

Longe mi atendis pacience, farante tion pro bono de la Esperanta afero.

Fine...

Fine ŝi revenis.

Kun serenigita vizaĝo.

– Kie vi estis ? mi ekkriis.

– Mi... mi sekvis la instruon, kiun vi citis al mi. Mi iris al la belegaj krakovaj « Plantoj » (urba ĝardeno) por serĉi tie travivaĵojn.

– Kaj vi iris nokte, sola ?

– Ne, mi iris ge.., gesole...

Ĉagrenegita, mi forlasis ŝin kaj decidis foriri hejmen, ne atentante eĉ plu la belajn naciajn dancojn, prezentatajn de la apartaj grupoj.

Mi do serĉis mian kongresan amikon, kun kiu mi estis kune enloĝigita.

Sed vana estis mia serĉado. Laŭ informoj de samideaninoj li jam antaŭ unu horo malaperis de la balo kun iu belulino.

Mi reiris hejmen, malrapide, promenante tra la dormanta Krakovo kaj ĉiudekpaŝe kontrolante laŭ Esperanta plano la ĝustecon de la direkto.

Post du horoj mi revenis fine hejmen.

Mia amiko ankoraŭ ne estis tie.

Li revenis nur matene, kiam mi jam rapidis al laborkunveno.

Li ŝajne sekvis la instruon, donitan dum Literatura Mateno.

Spertuloj ne venas, nespertuloj ne venas.

Irante al la kunveno, mi rimarkis en la Akceptejo i.a. anoncon, alvokantan ĉiujn gesamideanojn viziti duan kunvenon de iu faksocieto fondota.

Sube sur tiu anonco iu alskribis krajone :

« Mi spertis, mi ne venos ».

Sub tiu estis ankoraŭ unu krajona noto :

« Mi ne spertis, sed ankaŭ ne venos ».

Kaj tria :

« Mi nek spertis, nek venos ».

Strangaj homoj !

Devo de Esperantisto estas veni al ĉiu fakkunsido. Sperto aŭ konvinko ne gravas. Temas ja pri progresigo de Esperanto.

Barĉo ekmankis en Krakovo.

La saman tagon io terura okazis. Certa eminentulo, reprezentanto de grava tutmonda asocio esperantista, komence de la unua tago de la Kongreso senĉese konsumadis la polan nacian manĝaĵon – la barĉon.

Ĉar li estas tre energia kaj persista kaj faris tion cetere laŭ la indiko de forestanta komitatano de la asocio, forte rekomendinta al li tiun specialaĵon, en Krakovo fine ekmankis entute barĉo.

Malesperigita barĉemulo telegrafis tiam urĝe al sia konsilanto :

« En tuta Krakovo ekmankis barĉo telegrafu, kion fari ».

Pri respondo mi ne estas informita.

Ekskurso al Wieliczka.

Ĉe fino de la Kongreso okazis tre interesa ekskurso al la salminejo en Wieliczka.

La Esperantistaro estis solene akceptita en la stacidomo. Muziko ekludis je nia honoro. La reprezentantoj de la minejo kaj urbo parolis en Esperanto.

Ni estis ĉiuj tre kontentaj.

Poste ni malsupreniĝis sub la teron, kie ni vagadis dum longa tempo, miregante pri la subteraj lagoj, salonegoj el salo kaj aliaj kvazaŭ sorĉaj aferoj.

Ferma kunsido.

Sekvanta tago estis la lasta de la Kongreso. Jam matene okazis la ferma kunsido.

La prezidanto dankis al la ĉeestintoj, la kongresanoj dankis al la prezidanto.

La dankoj estis kvazaŭ intence longigataj por forpuŝi la malgajan momenton de disiĝo.

Tiu momento tamen venis. Eksonis la bela himno « La Espero ». Ĉio finiĝis. For estis la ĝojaj tagoj de Krakovo.

Larmojn mi verŝis dum la disiĝo kun gesamideanoj tutmondaj, precipe kun la malfidelulino, trompinta min dum la internacia balo.

Sed ŝi solene promesis nun al mi la unuan dancon dum la XXIV-a en Parizo.

Mi kredas al ŝi, sed samtempe avertas la vizitontojn de la Pariza Kongreso :

Ne dancu la unuan dancon kun samideanino...

(Rim. de la Redakcio : Pro manko de loko ni devis forstreki la pluan finparton de la raporto).

23-a Universala Kongreso de Esperanto, Kraków 1931

Dum la Internacia Balo.

Partoprenintoj de l'8-a Kongreso 1912 en Krakovo, venintaj al la 23-a en 1931.

23-a Universala Kongreso de Esperanto, Kraków 1931

Dankon al la Loka Kongresa Komitato

Dum kriza momento vi kuraĝe plenumis la taskon kiun transdonis al vi la esperantistaro, nome organizi nian ĉiujaran feston. Malgraŭ la nuboj super ni kaj inter ni, vi ĉiel klopodis kontentigi la kongresanojn. Koran dankon al vi kaj al la kunhelpantoj en akceptejo de l'stacidomo, en la poŝtoficejo k. a.

Inĝ. EUGENIUSZ TOR
vicprezidanto.

Dro LEOPOLD DREHER
sekciestro de kursoj.

Inĝ. JERZY SOWINSKI
sekciestro de distraĵoj.

JÓSEF ALFUS, kasisto

S-ino JULIA NEUBERGOWA
sekciestrino de loĝejoj.

Prof. ODO BUJWID
Prezidanto.

Prof. TADEUSZ HODAKOWSKI,
ĝenerala sekretario.

Inĝ. EDWARD KOSTECKI
vicprezidanto.

Dro TADEUSZ PIOTROWSKI
sekciestro de ekskursoj

Prof. TADEUSZ BILINSKI
propaganda sekciestro.

STANISŁAW RUDNICKI
organiza sekretario.

Nuntempaj problemoj

La profitoj de l'industrio

Dialogo pri delikata temo

« Ampleksaj mendoj por livero de malpezaj maŝinpafiloj al diversaj ŝtatoj kaj man-maŝinpafiloj estas en prilaboro. La novaj 13 milimetraj maŝinpafiloj kontraŭ aviadiloj, specialaĵo de la societo trovas kreskantan disvastiĝon ».

« Kio estas tio ĉi ? Kion vi diras ? »

« Tio estas laŭvorte citata el negoca raporto de la firmo Hotchkiss kaj K-io en St. Denis apud Parizo ».

« Neniam mi aŭdis pri tio — sed denove la Francoj ».

« La akciuloj estas plejgrandparte angloj. Sed ĉar necesas por la produktado de kanonoj, maŝinpafiloj kaj municio (laŭ la negoca raporto) ŝtalo kaj eksplodigaj materioj, vi povas esti certa, ke ankaŭ la germana produktado partoprenas dank' al la ekonomia interplektiĝo : Unuigitaj ŝtaluzinoj en Düsseldorf (kapitalo 800 milionoj da RM) trans la Internacia Krudŝtala Komuneco, per la I. G. Farben (kapitalo 1100 milionoj da RM) pri kemiaĵoj trans la granda Kuhlmann-Konzerno en Paris (300 milionoj da Frk.) kaj per la Imperia Kemia Industrio, London (kapitalo 95 milionoj da funtoj sterlingaj) por livero de eksplodigaj materioj. Vi certe scias kiel la berlina sprito variis la kanton « Du animojn kaj unu penso ». La fabrikantoj por armado nome kantas: Du patrolandoj kaj unu banko ».

« Sed ni ja estas devigataj. Ĉio tio ĉi ja estas historie klarigebla ».

« Certe. Historie klarigebla estas ankaŭ la bonfido per kiu vi kaj aliaj daŭrigas argumenti per tiu ĉi historia kaŭzo. Vi indigniĝas. Se mi rajtas daŭrigi mian rakonton vi certe pardonos al mi mian krudecon. Vidu ekzemple Hotchkiss. Kiu konas tiun firmon ? Ĝi estas unu el kelkaj dekduoj. La firmo komencis 1887 per kapitalo de 6 milionoj da Frankoj. Hodiaŭ ĝi valoras laŭ la bilanco 16 milionojn da Frankoj ».

« Tio estus laŭ ora valoro ----- atendu momenton ----- proksimume nur la duono de la antaŭmilita kapitalo ».

« Efektive ..... sed kio okazis inter tiu-ĉi tempo ? Jam en 1918 la kapitalo estis altigita ĝis 16 milionoj da Frankoj kaj la firmo povis dum 1916 kaj 1918 dufoje donaci al la akciuloj tiajn favorakciojn kaj repagi la tutan kapitalon. Fakte oni do repagis ĝin trifoje. Anstataŭ la akcioj oni eldonis tiajn « ĝu-kuponojn » kies bela nomo evidentiĝas tuj, kiam oni scias ke la dividendoj altiĝis depost 1923 de 50 ĝis 90 procentoj. Oni « ĝuas » do de akcioj por kiuj oni nenion pagis ĝis 90 procentoj ».

« Sed tio povus ja ..... »

« vomigi. Efektive. Kaj vi poste ankoraŭ ne fartos pli bone, se vi konsideras, ke Hotchkiss estas fakte nur malgranda entrepreno apud la gigantoj : Vickers en Anglujo, Du Pont en USA, Schneider en Francujo, Skoda en Ĉeĥoslovakio, Mitshubishi en Japanujo. Terni-Vickers en Italujo ne estas same ampleksa kiel tiuj cititaj, sed ankaŭ ĝi eksportas la sanktajn objektojn de la defendo del' patrolando al turkoj kaj balkananoj. Ĉiu de tiu ĉi giganto estas ĉirkaŭita de girlando de malgrandaj entreprenoj, laŭtakse ĉirkaŭ 150. Ekzistas laŭ la lasta « Jarlibro de la aer-flotoj » proksimume 190 firmoj kiuj konstruas aviadilojn pormilitajn. El ili 44 en Francujo, en Anglujo 29, en USA 38, en Italujo 17 k.t.p. Eble vin maltrankviligis ankaŭ la fakto ke en Eŭropo estas 12.600 militaeroplanoj tute batalpretaj. Pli bone estus nur kalkuli la nestojn en kiuj koviĝas tiuj rabobirdoj el ŝtalo. Se ili, kaj eble tio okazos baldaŭ, traflugos la aeron, rulos sur la tero ĉirkaŭ 5.000 modernaj gigant-saŭrioj, la tankoj, longaj je dekdu metroj kaj altaj 5 metroj por frakasi tiujn el la eŭropanoj, kiuj postrestis del' efiko de 37.000 kanonoj kaj minĵetiloj, plus 98.000 maŝinpafiloj, en maro de venena gaso ».

P a ŭ z o .....

« Sed tiuj ciferoj certe estas trograndigitaj ! »

« Mi ne posedas sufiĉan fantazion por eltrovi ilin. Cetere estas nur minimum-nombroj. Se vi indikas unu kanonon tro multe, oni denuncos vin pro malbonfamigo de honestaj komercistoj. Ankoraŭ pli nekredeble ol la nombro de 150.000 mortig-maŝinoj, por defendi inter si la 60 patrolandojn, estas la sumoj de la profitoj, rezultiĝantaj el la produktado de tiuj armiloj. Simile kiel ĉe Hotchkiss, kiu ja nur havas etan butikon kompare al la aliaj, oni donacas akciojn al la akciuloj kaj repagas la kapitalon. Foje ili nenion eĉ informas pri tio, ĉar estas tro multe da favoroj. Ĉiuj paperoj perdis, eĉ kaŭĉuko kaj metaloj notis grandajn perdojn. Sed la Armada Magazeno de Eŭropo estas ja « historie pravigebla » kaj pro tio « nepre firma » kiel esprimiĝas la borsanoj ».

Kaŝe mi aldonis, ke la fundamento de tiu ĉi historia kaŭzo estas tre firma, nome la malspriteco de la homoj.

Sed li aŭdis ĝin. « Vi estas ne tre ĝentila. Germanujo ekzemple ne povas permesi al si tiajn saltetojn. Al ĝi oni ja mezuras ĉion ».

« Mi preferas respondi al vi per ciferoj. Ankaŭ el ili sonas kanto sen vortoj ».

Laŭ la budĝeto de 1913 (ne 1931) Germanujo elspezis por la tera armeo, sen floto, sen kolonioj, nur por artilerio kaj armiloj . . . . . 65.097,514 Mark.
Laŭ la budĝeto de 1931 la tera armeo germana elspezas por armiloj, municio kaj armea materialo 66.739,050 RM.
La interna divido ne egalas por la du ekzemploj. Sed vi povas esti certa, ke la nura armad-industrio germana, produktanta la armad-materialon ne ricevas malpli da mono nuntempe, por armeo de centmil homoj, ol 1913 por 700.000 »

. « Sed kiu do ricevas tiun amason de mono, kio en la glora antaŭmilita epoko ankaŭ ne estis pli granda ? »

« Tion mi ankaŭ povas diri al vi, eĉ ne riskante esti persekutata pro perfido de l'patrolando. En la oficiala gazeto (Deutscher Reichsanzeiger) de la 14-a de Junio 1927 estas oficiale montritaj la 33 firmoj, kiuj laŭ la interkonsento kun la Entente rajtas preni de ni tiom da mono, kiom en 1913 por la sepfoje pli granda armeo ».

« Vere tio staras en la oficiala gazeto ? Kaj la profitoj de tiuj germanaj firmoj ? Kiel vi pensas pri ili ? »

« Pri tio mi nenion pensas, sinjoro ».

(Laŭ Welt am Montag) (Aranĝis G. Agricola.)

Lord Irwin pri Hindujo

Reveninte Anglujon post fino de sia leĝa periodo en Hindujo kiel vic-reĝo, Lord Irwin estis invitita prelegi al Kongreso de britaj misiistoj sub prezido de l'arkepiskopo de Canterbury. Li ekzamenis devojn kaj interesojn de Anglujo en Hindujo. Jen resumo de lia prelego laŭ The Times (22.VII.1931) :

Kiel mi vidas, Granda Britujo havas pezajn devojn en Hindujo, kiujn ĝi ne povas ignori, en tiaj aferoj kiel defendo, financa kredito, la protekto de ĉiuj malplimultoj kaj la estonteco de la oficistaro varbita sub aŭtoritato de nia Parlamento.

Ankaŭ vivgravajn interesojn ĝi havas sur la ekonomia kampo. Por Granda Britujo kaj ties industria loĝantaro, kies ĉiutaga pano dependas je transmara komerco, estas vivgrava afero havigi tiom larĝan parton de la hinda importado kiom eble.

Sed tio-ĉi estas tute malsama ol aserti ke Britujo rajtas trudi al hinda konstitucia progresado kondiĉojn ne avantaĝajn por Hindujo sed diktitajn pro ĉefa intereso de Britujo. Tia sinteno estas tute malkonforma je la principo de brita Komisiado por hinda bonfarto.

Ne estas mia tasko diskuti ĉi-tie ĉu la hinda naciista opinio prave aŭ malprave malŝatas tiun principon. Ke ĝi efektive malŝatas ĝin, tio estas ja fakto konata de ĉiuj, kiuj observas ties pensmanieron, kaj vere neniu bezonas genian imagpovon por kompreni la kaŭzojn de tiu malŝato.

Sed tion ĉi mi deziras akcenti, ke laŭ tiu principo mem, kiun oni ofte citas, la interesoj de Hindujo devas nepre havi la unuan lokon pro la sama kaŭzo kiel oni rigardus kiel malaprobindan tiun komisiaton, kiu trouzus la fidan postenon por akceli sian propran intereson anstataŭ la interesojn konfiditajn al lia prizorgo.

Sed aparte de tiu morala flanko, mi certiĝis, ke ĉiu ajn provo akceli la britajn interesojn prefere al la hindaj estas antaŭkondamnita al plena malsukceso tie. Finfine la ĉefa brita intereso estas: kontentigita Hindujo en la Brita Imperio, kaj vi neniam atingos tion se vi donas al Hindujo kaŭzon pensi ke Britujo en sia politiko rigardas sian propran intereson antaŭ tiu de Hindujo.

Vidu la komercon, pri kiu oni foje diras ke la registaro devas agi energie por subteni la britajn interesojn. Eĉ lasante flanke la demandon ĝis kia grado la malaltigo de nia importo al Hindujo devenas de la ĝeneralaj ekonomiaj kondiĉoj, — kaj mi kredas ilin eĉ pli efikaj ol ĉiu propagando kontraŭ eksterlanda ŝtofo —, estas ja evidente ke komerco povas vivi kaj flori nur kiam vi havas bonvolajn aĉetantojn kune kun bonvolaj vendantoj. Unuvorte ĝi dependas de reciproka bonvolo. Se tio mankas, vi ne povas devigi ĝian fluadon. Same vi ne povas devigi akvon reflui monten anstataŭ valen.

Kaj certe la plej certa rimedo por akrigi tiujn malfacilaĵojn en la komerca sfero estas proponi ke Britujo faru ian politikan agon por perforte devigi Hindujon aĉeti tion, kion ni volas vendi.

Aliflanke, se Britujo estas preta senrezerve montri, ke ĝi nur intencas favori la verajn interesojn de Hindujo, ĝi trovos Hindujon multe pli volonte preta kunekzameni praktikajn rimedojn per kiuj kunagado povus efiki je avantaĝo de ambaŭ.

La vera diferenco de opinio inter multaj el la kritikantoj kaj mi estas la jena : ili ŝajnas kredi ke tiaspecajn britajn interesojn oni povas akceli per laŭtaj asertoj de la registaro, dume mi opinias ke ili povas kaj devas esti savataj nur per reciproka kompreno kaj konsento.

Pri tiuj homoj, kiuj volonte pridubas aŭ mallaŭdas la tutan provon atingi interkonsenton kun hinda penso per konferenco kaj eĉ kulpigas tiun metodon pri ĉio, kio misokazas, la vero estas, ke ili vivas en malreala mondo, kiu ne plu konformiĝas je la faktoj.

Ili similas la viron kiu eksurdiĝas aŭ ekblindiĝas kaj plendas, ke liaj najbaroj parolas malklare aŭ ke la lumo estas malbona, kaj dume la difekto estas pli proksima.

Estas tute senutile, kiom ajn forte vi ŝatus tion, supozi ke vi povus rekrei la Hindujon de antaŭ dek jaroj. Same ni ne povas rekapti la atmosferon de nia infaneco, eĉ se ni sopire memoras je ĝi.

La sorto de l'edzino de Lot estas la tradicia averto al tiuj, kiuj emus rigardi malantaŭen, anstataŭ klopodi por sukcesigi la nunan taskon.

La hinda problemo hodiaŭ estas la plej grava imperia problemo, kiun nia lando devas solvi. Ni havis aliajn en nia historio. Foje, kaj plej ofte, ni sukcesis, foje ni malsukcesis plorinde. Sed kiam ni malsukcesis, tion ĉefe kaŭzis manko de la justa spirito fida kaj simpatia kiu, malgraŭ malfacilaĵoj, entenis la sekreton de sukceso per tiu leĝo, laŭ kiu fido naskas fidon kaj malfido malfidon.

Profesoro Wladimir Kœppen

La 25-an de Septembro pleniĝas la 85-a jaro de la vivo, riĉa en laboro, sukceso kaj honoro, de l'nestoro inter la meteorologoj, profesoro D-ro Wladimir Koeppen, unu el la plej famaj, ĉie konataj scienculoj de nia tempo.

Naskiĝinte en 1846 en Petroburgo, Koeppen pasigis la plej grandan parton de sia vivo en Hamburg, kiel estro de la meteorologia sekcio de la Germana Marobservejo (Deutsche Seewarte), en kiu pozicio lin sekvis lia bofilo Alfred Wegener. Kiam tiu ĉi en 1925 estis vokata kiel profesoro al la universitato en Graz, ankaŭ Koeppen transloĝiĝis en tiun urbon. Malgraŭ sia aĝo W. Koeppen daŭrigis tie sian sciencan laboradon. Ja, en komuneco kun sia bofilo A. Wegener, li kreis kvazaŭ novan sciencon: la klimatologion de la antaŭaj geologiaj epokoj. Pro tio la tragika morto en Grenlando de tiu lerta kaj kuraĝa esploristo, kaŭzis duoblan perdon al Prof. Kœppen al kiu ne nur liaj samfakanoj sed multaj aliaj kaj inter ili ni Esperantistoj prezentas plej korajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de lia festotago.

Ne estas ja mirinde ke la eminenta scienculo, kies ampleksa spirito kaj homama koro ĉiam interesiĝis fervore kaj ageme pri la plej diversspecaj kulturproblemoj, fariĝis ankaŭ partiano de la movado por enkonduko de universala helplingvo. Atentigita en 1908 per la skribanto de tiuj linioj pri Esperanto, li jam en la sama jaro publikigis artikolon en « Scienca Revuo ». Al la kongreslibro de la kvara germana Esperanto-kongreso en Gotha, Prof. Koeppen kontribuis enhavoriĉan traktaton germanlingvan pri « Esperanto kaj la germana gazetaro ». Tre rimarkinda estas ankaŭ lia propono, ke oni uzu la Zamenhofan alfabeton por la internacia transskribado de geografiaj nomoj. Antaŭ ĉio tamen ni devas danki al nia altŝatata samideano pro tio ke lia ekzemplo kaj influo kontribuis efike al la forigo de antaŭjuĝoj, kontraŭ nia afero en la sciencularo.

Ni esperu kore kaj sincere ke favora sorto havigu al Prof. Koeppen ankoraŭ multajn jarojn travivotajn en plena forto de korpo kaj spirito, en saneco kaj feliĉo ! A. S.

Tra la Mondo Esperantista

Antaŭkongreso en Breslau

La antaŭkongreson en Breslaŭ partoprenis kongresanoj el dek landoj. Amika kunveno 30-7 sur Liebichs-altaĵo, 31-7 gvidadoj tra la urbo, aŭtobusa rondveturo. Samvespere akcepto per la Urba estraro en la salonego de la urba deputitaro. Alparolis la kongresanojn urbestro Mache en la nomo de la urbo, Geheimrat Rosenfeld por la « Gesellschaft für vaterländische Kultur » kaj la Humboldtsocieto, D-ro Grumbkow en la nomo de la Radio-stacio. Por la esperantistoj en Breslaŭ parolis S-ro Freund, la Delegito de UEA. Vizito al la mezepoka urba domo kaj la muzeo en la iama kastelo finis tiun antaŭkongresan kunvenon. La partoprenintoj kore dankas al F-ino Koschate, S-ro Zenker, F-ino Polier por la afabla gvidado.

Fakaj kunvenoj

Studentoj

Dum la 23-a Universala Kongreso okazis la 4-an de Julio la studenta fakkunveno, kiun ĉeestis kelkdeko da studentoj kaj multaj eminentuloj, inter aliaj s-ro Prof. D-ro Jikichiro Kawahara, rektoro de la Somera universitato. Estis proponataj du inter si kontraŭaj rezolucioj, unu de la « Pollanda konsilantaro de stud. esp. organizajoj» kaj la dua de la « Studenta esperantista klubo » el Zagreb (Jugoslavio). Post longa diskuto oni fine trovis kompromisan solvon kaj la kunveno unuanime akceptis la rezolucion, laŭ kiu oni ĉiujare dum la Universalaj Esp. kongresoj elektos unu el la stud. esp. kluboj kiel Int. stud. esp. ekzekutivon. La taskoj de la Ekzekutivo estas kunligi la studentojn esperantistojn por pli efika propagando, helpi al ili per informoj, reprezenti ilin en ĉiuj internaciaj interrilatoj. Tiucele la Ekzekutivo eldonos almenaŭ unu foje po semestro presitan bultenon je elspezoj de la koncerna klubo. Kiel ekzekutivo por la jaro 1931-32 estis ĉiuvoĉe elektita la « Studenta esperantista klubo » el Zagreb, kiu komencos sian laboron en Oktobro. La kunvenon prezidis S-ro Lapenna Ivo, kand. jur. el Zagreb.

Kuracistoj

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio kunvenis la 6-8-31. en Krakovo en la bele ornamita salono de Krakova Kuracista Societo. Ĉeestis 55 personoj inter ili Prof. D-ro Suzuki el Tiba, Japanujo, Prof. Canuto el Torino, D-ro Philippet el Parizo, D-roj Bulyovsky kaj Kondács el Hungarujo.

Salutteleg ramojn sendis : La ĉefa kuracista organizajo pola, la Supera Kuracista Ĉambro, la redakcio de Gastrologja Polska (kiu enpresas esp. resumojn) Prof. Asada el Nagasaki, D-ro Stamatiadis el Ateno, D-ro Briquet, Lille, D-ro Kempeneers, Bruselo, D-ro Bluth, Bad Neuenahr kaj multaj aliaj.

Salutis la kunvenon persone : Reprezentanto de la Krakova Kuracista Societo, Kolonelo D-ro Maciag, Krakova Kuracista Ĉambro, Docento D-ro Zielinski, S-ro John Merchant, prezidanto de ICK, S-ro Joh. Karsch, vicprezidanto de UEA, kaj Profesoro Bujwid por la Loka Kongresa Komitato.

Malfermis la kunvenon D-ro Blassberg, eks-prezidanto de TEKA. Prezidis D-ro Robin, alterne kun D-ro Blassberg.

Prelegoj :

D-ro Blassberg : Pri la antikva Krakova Medicina Fakultato kaj famaj Kuracistoj krakovaj.

Prof. D-ro Canuto : Pri Medicinistoj kaj la nova itala punlegaro.

D-ro Bulyovski : Pri la virina kaj infana prizorgo en Hungarujo.

D-ro Leon Zamenhof : Pri fuŝkuracado kaj moderna medicino.

Sekvis vigla diskutado precipe pri la lasta prelego.

Dum la kunsido la Krakova fabriko de mineralaj akvoj (Rzaca i Chmurski) disponigis senpage mineralajn akvojn tre bonvenigitaj pro la varmego.

La sciencan parton sekvis organiza. La direktoro de UEA laŭinvite prezentis planon pri starigo de medecin-fakaj Delegitoj de UEA speciale en banlokoj. La plano estos submetota al la tuta TEKA.

La kunveno finis je tagmezo. Riĉa tagmanĝo sekvis laŭ invito de D-ro Blassberg en Hotel de France, dum kiu regis bona humoro.

Posttagmeze okazis tiam ankoraŭ vizito al la modela asilo por spiritmalsanuloj en Kobierzyn apud Krakovo. La Direktoro D-ro Stryjenski salutis en Esperanto, montris la grandiozan instituton kaj regalis la gastojn per bonega vespermanĝo.

Resume : La TEKA tago sukcesis.

D-ro W. Robin.

Skolta Esperantista Ligo

10. Internacia Tendaro Budapest, 15-20 Julio

Ĉe alveno oficiala akcepto sur la ŝipponto kun flagetoj kaj lampionoj, paroloj en nomo de Hung. Skolta Asocio, HES, Katolika Esp. Soc., UEA.

Salutis 17 landoj, inter ili Argentina Skolta Asocio kaj kunprezidanto de Hungara Skolta Asocio, kiu oficiale invitis kaj zorgis pri ekskursoj. Aliĝis 70 skoltoj el 5 landoj. Vizitis la tendaron esperantistoj el Ĉeĥoslovakio kaj Francujo, skoltgvidantoj el Danujo kaj Litovujo, skolto el Polujo kaj la ĉefskolto de Hungarujo. Okazis tri tendarfajroj kaj unu ferma kunveno kun disdono de multaj premioj (de UEA, Hungalanda Esp. Soc. Katolika Vivo, Literatura Mondo, Heroldo de Esperanto kaj aliaj). La Hungara Nacia Ligo sendis reprezentanton kaj librodonacojn. La oficiala gazeto de Hungara Skolta Asocio enhavis esperantan salutartikolon kaj aliajn tekstojn en Esperanto. Aperis multobligite « Tendara Heroldo » unu paĝa dufoje, kaj apartaj glumarkoj. Oficiala akcepto en la Skolta Domo kaj Roverskolta Parko. Belaj ekskursoj. Dum kunveno de Skolta Esperantista Ligo sendo de proponoj al Skoltgvida Mondkonferenco, Baden; Rovera Mondtendaro, Kandersteg, Esperanto-Kongreso, Kraków, por akceli Esperanton kaj skoltismon ĉiulande. SEL estonte eldonos propran bultenon senpage por ĉiuj membroj. La ĉefa sukceso estis : Junuloj, kiuj lernis Esperanton dum unu vintro povis bone interkompreniĝi, helpi unu la alian laŭ skolta idealo kaj ligi novan amikecon inter si. Bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj naciaj esperanto-societoj ignoris la preparajn laborojn. Menciinda estas la grupo de Debrecen, kiu kolektis monon por sendi 8 skoltojn malriĉajn. Oni dankas al UEA por la premioj, kaj al ICK pro morala helpo. Oni rekomendis la Cseh-metodon, kiel plej konvenan al instruado por skoltoj. La Hungara Skolta Asocio eldonis por la tendaro oficialan skoltan ĉemiz-insignon kun verda stelo. Por la sukceso multon klopodis hon. ĝen sekr. de SEL : trupestro N. *Booth*, oficiro *Halmai* ĉefdelegito de UEA *Balkányi* kaj redaktoro *Totsche*. Flanke de la Skolta Asocio ĉefsekr. dro *Molnar* kaj Dro *Major*, sroj. Attila *Kun*, *Kertai* kaj *Fischer*. – Multon helpis la londona kasisto de SEL, sro. D. *Davis*. Esperantan predikon aranĝis skota pastro *Morgan*.

Kunveno en Krakovo

Dum la 23-a kongreso en Krakovo okazis skolta kunveno, kunvokita de S-ro Emil Mayer, agento de la Skolta Ligo por Polujo. Interalie oni diskutis la organizon de sp. skoltoj en Polujo kaj aliĝon al la Skolta Ligo. Ĉeestis tiun kunvenon aro da skoltoj el pluraj landoj. (Laŭ E. M.).

Kandersteg

Dimanĉo, la 2-an de Aŭgusto 1931 vizitis la Rover-Tendaron en Kandersteg la 3 samideanoj; S-roj Schmid, Rotach kaj Liniger, ĉiuj el Bern. Ŝarĝitaj kiel komercvojaĝistoj ni trairis tiun tendaron, disdonante inter ĉiulandanoj Esperanto propagandilojn. Ĉie ni parolis kun skoltoj pri ceio kaj disvastigo de Esperanto.

(Liniger)

Kontraŭmilita movado

La Internacionalo de Kontraŭmilitistoj (Militrezistantoj), kies ĉefoficejo estas 11, Abbey Road, Enfield, Middlesex, Anglujo, kunvenis en sia Internacia Konferenco, en Lyon, Francujo, la — 4-a Aŭgusto. El la sekcioj en 22 diversaj landoj, 18 estis reprezentataj. Membroj nun troviĝas en 56 diversaj landoj. Ĉiu ano sin devigas pri persona rezistado kontraŭ milito kaj ĉia perfortaĵo armita. La Movado estas por kompleta malarmado kiel ekzemplo.

PLI BONA ESPERANTISTO
vi volas fariĝi ! Tiucele nur partoprenu **Superan Esperanto-kurson perleteran.** Postulu senpagan enkondukon. **Leono Funken,** dipl. Esp. Instruisto, Moselweisserstrasse 20, Koblenz, German.
Serioza kontrolado.

Stenografoj

Internacia Kongreso de Stenografio okazis en Parizo, la 3-an ĝis 7-an de Aŭgusto. En Stenografia ekspozicio tri fakoj estis rezervitaj por Esperanto. Okazis konkurso de esp. stenografado kaj kunveno de l'Internacia Asocio de Esp. Stenografistoj. Laŭ invito de la kongresa prezidanto ankaŭ ne-esperantistoj ĉeestis tiun kunvenon dum kiu oni parolis kaj diskutis preskaŭ nur en Esperanto.

Kiel regula programero, Esperanto estis daŭre citita... de la ne-esperantistoj. Nur dufoje la Esperantistoj mem parolis, nome por prezenti deziresprimon kaj due dum la festeno.

I.A.E.S. prezentis jenan deziresprimon :

« Por malhelpi ĉiujn malfacilaĵojn de reciproka interkompreniĝo, rezultiĝantaj el la malsamaj lingvoj uzataj de l'kongresanoj la Pariza Internacia kongreso de Stenografio voĉdonas ke dum la estonta unuea kongreso oni ekzamenu la utilecon de Esperanto, kiel solan lingvon uzeblan por la traduko de komunikaĵoj aŭ paroladoj faritaj en nacia lingvo. »

Samtempe I.A.E.S. decidis prezenti alian deziresprimon al ICK kaj la L.K.K. de la 24-a kongreso de Esperanto en Parizo :

« Internacia Asocio de Esperantistaj Stenografistoj petas la Internacian Centran Komitaton kaj la Organizan komitaton de la 24-a kongreso, organizi dum la 24-a ekspozicion de esp. verkoj kaj konkurson de esp. stenografiio. »

Tri premioj estis aljuĝitaj pro merito en la ekspozicio :

1. Ĉefpremio al la I.A.E.S. 2. Ĉefpremio al S-ro Flageul por alfaro de sistemo Duployé en Esperanto. 3. Ora medalo al S-ro Cogen en Ninove por stenografia mnemoniko kaj alfaro de sistemo Groote al Esperanto.

Por rekompenci la aktivecon de siaj membroj la IAES donis jenajn premiojn al :

Arĝenta medalo al S-ro Lefebvre (por alfaro de sistemo Aimé-Paris. Arĝenta medalo al S-ro Mori (kunhelpo dum ekspozicio kaj kunlaboro al Internacia Stenografisto.

Granda bronza medalo al S-ro R. Llech-Walter (fondo de nacia sekcio de IAES en Francujo).

Granda bronza medalo al S-ro Quitadamo (fondo de nacia sekcio de IAES en Italujo).

Bronza medalo al S-ro Major (Kunlaboro al I. St.).

Laŭdaj mencioj al : S-roj Kökeny, Hoen, Hager por kunhelpo.

La ekzameno de la konkurso donis jenajn rezultojn :

1. F-ino Castel : Dua premio : 40 Frk. — Skribis 60 silabojn minute.

2. S-ino Major : Unua premio : 100 Frk. Bronza medalo. 100 silaboj.

3. F-ino Piau : Dua premio : 100 Frk. 140 silaboj minute.

La kongreso ŝatinde helpis al la disvastiĝo de nia ideo inter stenografistoj kaj multaj promesis lerni la lingvon, inter ili famaj kolegoj.

(Laŭ raporto Flageul).

Dum la Svisa Stenografa Kongreso en Rüti (Zürich) 6-6-31, S-ro Robert Kreuz, Direktoro de ICK akiris 2-an premion por stenogramo de 220 silaboj en Esperanto, kaj saman premion por germana (200 silaboj) plie unuan premion por 140 silaboj en franca lingvo. (Sistemo Stolze-Schrey).

Zamenhof-Monumento

Soleno en Bialystok

La 12an de Aŭgusto alvenis Bialystokon el Varsovio karavano de 60 partoprenintoj de la XXIIIa, gvidata de la vicprezidanto de Bialystoka Postkongreso D-ro Datner.

La alvenintojn salutis ĉe la alveno de la vagonaro membroj de la organiza komitato kun prez. J. Ŝapiro, reprezentantoj de la urbestraro, militistaro k.t.p. Orkestro de l'42-a regimento ludis « La Esperon ».

Post disdono de hotelkartoj kaj forveturigo de la gastoj al iliaj loĝejoj, okazis je 12a horo tre impona soleno de fundamentometo por Zamenhofa monumento.

La loko de estonta monumento, situita tre bele ĉe komenco de la urba arbaro sur ronda placo de kruciĝo de 6 stratoj, estis plaĉe ornamita per polaj kaj esperantaj flagoj, floraro kaj Esperantaj emblemoj. La ordon gardis honora taĉmento de fajrobrigado kaj reprezentantoj de loka esperantistaro.

Apud la tribuno staris modelo de la monumento, kies aŭtoro estas fama varsovia artskulptisto A. Ostrzega. La monumento prezentos Babelan Turon (12 m. da alteco).

Al la soleno venis krom la Esperantistoj ankaŭ reprezentantoj de la registaro, urbo, sociaj organizaĵoj ktp.

Kiam alvenis la vic-vojevodo Zawistowski, anstataŭanta la vojevodon, forestantan pro kuracado, militista orkestro ludis marŝon, post kio la vic-vojevodo subskribis la akton pri la monumentosoleno. Sekvis subskriboj de aliaj eminentuloj.

La vic-vojevodo Zawistowski inaŭguris post tio la solenon per pollingva parolado, tradukita en Esperanto de prez. Ŝapiro. En tiu parolado li menciis i.a. ke la fama bialystokano Zamenhof estis gvidata de altaj ideoj pri paca kunvivado de la popoloj kaj tiuj ideoj trovas ĝuste plej varman komprenon en Polujo.

En la nomo de la urbo parolis vic-urbestro D-ro Ziemilski, kiu dankis al la organiza komitato por la disponigo de la monumento al la urbo kaj al la gastoj pro ilia alveno por honorigi Zamenhof.

J. Ŝapiro, prezidanto de l'Org. Komitato

En la nomo de la I.C.K. de la Esp. Movado parolis Direktoro Robert Kreuz, kiu akcentis ke la tutmonda Esperantistaro estas dankema al la patrujo de Zamenhof por lia honorigo.

Poste estis laŭtlegita la akto kaj la vic-vojevodo Zawistowski enmurigis ĝin sub la fundamento, kiel ankaŭ la unuan fundamentan ŝtonon. La sekvantajn ŝtonojn enmurigis la reprezentantoj de la urbo kaj ŝtata administracio, familio Zamenhof (D-ro Leono kaj f-inoj Lidja kaj Sofio), I.C.K. kaj de apartaj nacioj, venintaj al la Postkongreso.

Dum komuna tagmanĝo, kiun partoprenis la Esperantistoj kaj reprezentantoj de la registaro kaj urbo, toastis prezidanto Ŝapiro kaj Direktoro Kreuz.

Poste la kongresanoj vizitis la urbon kaj speciale Zamenhofan naskodomon, kie denun kuŝas t.n. « ora libro » kun subskriboj de la vizitantoj.

Je 6a horo vespere en la salono de la urba konsilantaro okazis solena kunsido de la Postkongreso.

Parolis la prezidanto de la org. komitato J. Ŝapiro, reprezentanto de la vojevodo D-ro Raczynski, vicurbestro D-ro Ziemilski, D-ro Leono Zamenhof kaj reprezentantoj de esperantistoj de 15 landoj. La kunsidon finis komuna kantado de la himno.

Post komuna vespermanĝo la teatra sekcio de loka Esperanto-S-to prezentis Esp. revuon « La stela parado ». Ĝin reĝisoris s-ro Ŝ. Osovicki. La prezentado tre plaĉis al la multnombra publiko.

La ampleksan programon de la Postkongreso finis balo en la reprezentaj salonoj de vojevoda palaco. La gastoj bone amuzis sin ĝis mateno.

Sekvantan tagon du grandaj aŭtobusoj forveturigis la gastojn al la la mondfama Bjaloveja arbarego, kie Inĝeniero Jasinski gvidis la esperantistojn tra virga arbarego kaj montris al ili la urojn, granda maloftaĵo.

Ĉiuj kongresanoj ricevis krom kongresa libreto ankaŭ belan gvidfolion tra Bialystok, eldonitan de Turisma Servo de UEA kun financa helpo de Bialystoka magistrato.

Oni dankas

*** Gesinjoroj Lee el Crewe, Anglujo, tre dankas al la jenaj samideanoj servintaj dum vojaĝo en Germanujo : S-ro Schreiber, Gummersbach, S-ro Vehl en Köln, F-ino Schreiber kaj S-ro Göring en Magdeburg, kaj S-ro Max Jannasch en Leipzig.

*** S-ro Richard Pfütze, Sao Paulo, Brazilo, Ano 18407 kore dankas al la Delegitoj en Tokio, Shizuoka, Nagoya, Osaka kaj Kobe plie al la D en Napoli por afabla helpo dum mondvojaĝo.

*** S-ro Adolfo Oberrotman, Ano de UEA 5181 en Varsovio kore dankas al S-ro R. Vannuco en Tarvisio, S-ro Arabeno, Del. en Genova, S-ro Ettore Fasce, al S-ro Rondini en Sampierdarena Prof. D-ro Canuto en Torino kaj al S-roj Canonico Mayo, Ramolfo al S-ro Nišimura, F-ino Gabrielle Gérard, S-ro Münz, Ĉd en Berlin, Sinjoroj Schulz kaj Glück, kiuj per afabla helpo plibeligis mian vojaĝon.

*** Bulgara Esp. Karavano kore dankas al S-ro Raymund Čech, Del. de UEA en Vieno por lia servado, gastigi la bulgarajn samideanojn kaj montri al ili la vidindaĵojn de la urbo.

Solena malfermo de l'Esperanto-Domo en Arnhem

La 11-an de Aŭgusto okazis en Arnhem (Nederlando) la solena malfermo de la Esperanto-Domo disponigita de la Arnhema urbestraro al la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto por tie krei kulturan centron helpe de la internacia lingvo.

Kiel signo de simpatio, la urbo ornamis ĉiujn tramojn per verdaj esperantaj flagetoj. Ankaŭ en diversaj lokoj en la urbo estis videblaj niaj standardoj, altirantaj la intereson de la urbanaro al nia afero.

La inaŭguro de la domo okazis en korvarma esperantista atmosfero simbole karakterizita de la internacia ĉeestantaro kunveninta el 10 landoj.

Sub la prezido de S-ino Julia Isbrücker la solenaĵo iĝis sukcesa manifestacio por nia lingvo kaj precipe por ĝia kultura valoro.

La paroladoj de S-ro Inspektoro Omloo (reprezentanto de la Ministro por Instruado) kaj de S-ro Geraedts (en la nomo de l' Ministro por Komerco kaj Laboro) estis pli ol okazaj simpati-deklaroj; ili montris larĝan komprenon de la kultura kaj praktika valoro de nia lingvo kaj esperigas pluan kaj plian sukceson en la nederlandaj oficialaj rondoj.

La urbestro de Arnhem, S-ro de Monchy, surprizis la ĉeestantaron per rimarkinda paroladeto en Esperanto. Lerninte nian lingvon, li persone ekkontaktis kun la esperantistoj kaj fariĝis tutkora subtenanto de niaj klopodoj.

Al ĉiuj respondis Pastro Andreo Ĉe, kiu en elokventa parolado konstatis la gravecon de la momento kiam esperantistoj ricevis oficialan videblan helpon de la aŭtoritatoj. Memorigante pri la sindonemo de D-ro Zamenhof, li alvokis al plua diligenta laborado, por ke Esperanto portu tiujn fruktojn, kiujn la homaro rajtas postuli de ĝi.

La ĉeestantoj, kortuŝitaj de liaj celtrafaj paroloj kaptis freŝan kuraĝon por la daŭrigo de la ĉiutaga batalado por la venkigo de nia ideo.

Post admirinda parolado de s-ro Prof. Casimir, la rektoro de la 4-a Internacia Kurso de Esperanto, kiu per sentitaj paroloj varme pledis por la paca rolo de Esperanto en la historio de la homaro, sekvis la alparolo de la reprezentantoj de la esperantistaj organizaĵoj. S-ro Dro Baart de la Faille, loka delegito de UEA gratulis en la nomo de l'Asocio, S-ro inĝ. Isbrücker bondeziris en la nomo del Lingva Komitato kaj ĝia Akademio kaj s-ro Heilker transdonis al la Cseh-Instituto donacon en la nomo de la Esperantista Ekzamena Komitato por Nederlando .

S-roj Christensen (Usono), Dro Ottmar Fischer (Hungarujo) kaj Advokato Sigismundo Pragano (Rumanujo) alportis la saluton de la fremdlandaj ĉeestantoj.

La samtempe en la Esperanto-Domo malfermitan internacian kurson, gvidatan de Pastro Ĉe partoprenas 56 kursanoj el 10 landoj (Nederlando, Anglujo, Germanujo, Francujo, Usono, Islando, Svedujo, Rumanujo, Hungarujo kaj Aŭstrio).

La kursanoj loĝas kaj manĝas en la komforta Esp.-Domo kiu de nun restas konstante malfermita kaj preta akcepti viziton de ĉiulandaj esperantistoj.

(S. P.)

Fondo de premio de 10.000 fr. frankoj por plej bona tutmonda lernolibro de integra eduko.

La integra eduko de homa estaĵo dependas de ĝerma heredeco, realiĝanta iom-post-iom, en kaj per sia universala integra medio. La celo de tiu ĉi-konkurso, patronata de la Internacia Ligo por Nova Eduko, estas montri : *a)* kiom ĉiu estas interesata pri tio ke la heredeco estu plejeble bona kaj plejbone edukiĝu en ĉiu ; *b)* kiom povas fari ĉiu edukato, iĝanta edukanto, por si mem kaj per aliaj en la tuta mondo ; *c)* urĝan neceson de interedukista akordo, ebla je la lumo de universala vidpunkto. Petu la kompletan noton

Groupe français d'éducation nouvelle.
41, rue Gay-Lussac — Paris (5°)

Esperantista vivo

Naskiĝoj.

*** Al Ge-sroj Vanneste-Verriest en Tourcoing Francujo, fileto Daniel, 19.6.31.

*** Al Ge-sroj Robert Wolf ano de UEA en Dresden filineto.

*** Al Ge-sroj Morris De Ketelaere, vicdelegito en Antverpeno, fileto Rudolf, 27.7.31.

*** Al Ge-sroj Stutzmann, Delegito de UEA en Leysin, Svis., filineto Françoise-Andrée, 22.8.31.

*** Al Ge-sroj Starke en Nürnberg, fileto Gerhard, 20.6.31.

*** Al Ge-sroj Debrouwere-Boudens en Kortrijk (Belglando fileto Karlo 21.6.31.

Edziĝoj.

*** S-ro Emil Eisenberg, Delegito en Jablunkau Ĉeĥoslov., kun F-ino Wilhelmina Grieb.

*** S-ro Petro Gerger, Delegito de UEA en Jimbolia, Ruman., kun F-ino Heleno Zvornik el Vel. Kikinda, Jugoslav., 16.6.31.

*** S-ro Edvardo Wiesenfeld, ano de UEA en Varsovio kun F-ino Lewenfiszówa, 6.9.31.

Honorigo.

*** S-ro William Perrenoud, D de UEA en Cernier Svislando akiris la gradon de scienca doktoro ĉe Universitato de Neuchatel.

Niaj Mortintoj

Kun sincera bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj samideanoj. Al la familioj ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

S-ro James D. Haiman, Ano de UEA 16038 en Pittsburgh, Pa. Usono. (Laŭ D.E.P.).

S-ro Walter Schrank, iama ano de UEA en Kempten im Allgäu, Germanujo. (Dato ne konata).

S-ino Dafine Jochmann (Spassoff) bulgara samideano, edzino de la Delegito de UEA en Langenau, Ĉeĥoslovakio, 20.6.31.

D-ro Wilhelm Hinsenkamp, Delegito de UEA en Essen Germanujo, 22.5.31. (Laŭ Juna Batalanto, n-ro 2.).

S-ro Giuseppe Santin, UEA ano N° 12866, iama nia Delegito en Venezia, la 23an de Julio mortiĝis pro grava terenfalo el fenestro dum kutima laboro.

S-ino Ersilia Minio, Anino de Espr. Grupo L. L. Zamenhof de Venezia kaj patrino de l'fervora UEA anino F-ino Carolina Minio, Delegitino en Zara, en Venezia la 25a de Aŭgusto.

S-ino Amélie Lucie Gonon, edzino de la Vicdelegito de UEA en Thiers, Francujo, 9.5.31.

S-ino Helena Joskowiczowa, fratino de S-ro D-ro Gutmann Delegito de UEA en Ostrolenka, Pol. 24. Junio 1931, 38 jara.

S-ro Max Schafroth-Lüdy, patro de nia Delegito en Burgdorf Svislando, 23.7.31.

S-ino Sindelarova-Blazkova Marie, patrino de nia delegito s-ro Zdenek Blazek en Mnichovo Hradiste.

S ro Oskar Sohr, eks-VD en Baĉka Topola, Jugoslavio, 3.9.31. Simpatia samideano, laborinta dum kelka tempo ĉe la presejo de ESPERANTO en Annemasse kiel kompostisto, kiun okupon li devis forlasi pro grava malsano.

Sinceran kunsention !

August FOREL

La 27 Julio 1931 mortis en Ŷvorne la fama scienculo Aŭgusto Forel. Pri lia vivo kaj verkoj abunde parolis la eŭropa gazetaro, precipe en germanlingvaj landoj, kie lia verkaro estas abunde tradukita kaj eldonita. Cetere li verkis mem egalbone france aŭ germane.

Fidela membro de UEA, al kiu li regule pagis sian kotizon, Forel subtenis nian movadon, en kiu li vidis grandan ilon por forigi malsaĝajn barilojn inter homoj kaj popoloj.

Ĉe lia funebra bruligo en la tombejo de Lausanne ĉeestis reprezentantoj de l'esperantistaro kune kun tiuj de l'Bon-Templanoj, ĉar li estis fervora apostolo kaj gvidanto de tiu kontraŭ-alkohola movado.

Sur la ŝtuparo de la krematorio lian filozofian testamenton legis lia filo mem. Tio anstataŭis religian ceremonion. Tiu longa kaj kompreneble diskutinda dokumento klarigas tute pozitivistan kredon, suspekteman je ĉiuj dogmoj kaj superstiĉoj, kaj finas per sincera aliĝo al la dek principoj de la bahaista movado, kiun Forel rekomendas al simpatio de la publiko. Noble sonis lia lasta adiaŭo kaj danko al lia edzino, kiu estas tre valora virino kaj lin helpis en ĉio.

Feliĉa viro pro tiu amo, Forel sentis grandan respekton al sia kunulino kaj al la tuta virina sekso. Tion vi tuj rimarkas en lia plej konata libro : La seksa problemo. Eduki la plenaĝulojn pri tiu temo plej ofte miskonata, diri la veron sen cirkaŭfrazo, sed kun luma pureco, honesta malkaŝemo kaj scienca tekniko, tamen scianta resti homa kaj simpatia, jen la maniero en kiu Forel sukcesis verki tiun libron, tradukitan en multegaj lingvoj.

Ne tie vi trovos la malnovmodan embarason de l'aŭtoro turnanta cirkaŭ la faktoj, ankaŭ ne la malbongustan ironion de tiu, kiu konsideras virinon kiel amuzilon por sinjoroj. Ne. Forel vidas la virinon egala al viro kaj pritraktas la temon kun tiom da digneco kiom da kuraĝo.

En la scienca rondo eĉ pli konsideratai estas liaj laboroj pri la homa cerbo, kiun li volonte komparis kun tiu de la formikoj. Jam kiel okjara knabo li komencis observadi tiujn insektojn kaj studi iliajn kutimojn. Tiun observadon li daŭrigis dum longa vivo okdekjara flanke de sia kariero kiel psikiatro kaj profesoro.

La vilaĝan domon, en kiu li mortis, li nomis « La Formikejo ». Kiu vizitis lin tie neniam forgesos la impreson. Tiu bela altkreska maljunulo kun blanka barbo kaj lumaj okuloj restis vigla kaj amike sprita malgraŭ la paralizo, kiu ĝenis lian brakon kaj langon en lastaj jaroj.

Li legis ĉion, sekvis ĉion, foje malpaciencis pri malrapideco de homoj je kompreno pri bezonoj kaj sopiroj de popoloj. En lia vilaĝa domo kun verdaj fenestrokovriloj vi ne trovis la tipan scienculon el reĝaj akademioj kun dekoracioj sur la brusto kaj invitoj de markizinoj sur la tablo.

Forel restis dum tuta vivo vera demokrato de primitiva Svislando. Al kongresoj li veturis triaklase aŭ marŝis kun sia dorsosako kaj vasta mola ĉapelo. Nek profunda scienco, akirita per studo kaj sperto, nek tutmonda famo, difektis tiun simplan kaj rektan karakteron.

Cetere nura scienco ne sufiĉis al li. Helpado al homoj konstante lin okupis. Nekalkuleblan nombron da malfeliĉuloj li konsilis, flegis, kuracis aŭ kuraĝigis. Lia domo ĉiam estis plena de tiuj. Samtempe al utilaj movadoj li donis sian subtenon kaj por ili bataladis kiel dudekjara kavaliro ĝis kvaroblo de tiu aĝo.

La esperantistaro danke memoros tiun fidelan amikon kaj pioniron de l'vero. P.

D-ro Edm. Sós

Dokloro Edmundo Sós, depost tridek jaroj la animo (jes vere la bona animo !) de la Esperanto-movado en Aŭstrio, mortis Sabate la 27-an de Junio 1931. Lia foriro el nia mondo postlasas orfan lokon vere malfacile okupigeblan. Li naskiĝis la 25-an de Decembro 1864 en Satoralja-Ujhely en Hungarujo kaj venis al Vieno por studi en la universitato en la jaro 1882; li promociis kiel kuracisto la 27-an de Junio 1891. Do, la tagon de sia morto li estus festinta la kvardekjaran jubileon de sia promocio. Nur tri jarojn li kuracadis por poste fariĝi dentkuracisto. En tiu speciala metio li fariĝis fame konata kaj ofte serĉata konsilanto.

Jam dum la unuaj jaroj de sia kuracista praktikado li aliĝis al la Esperantismo, laboranta modeste kaj tamen kun plej granda efiko. Lia ĉarma konduto kontraŭ ĉiuj, lia ĉiama kompleze mo, lia pasio por ĉio bona kaj bela kaj lia alta intelekto kune kun elfunda klereco ravis ĉiun, kiu havis rilatojn kun li. Senlace li laboris por la disvastigo de Esperanto, partoprenis kongresojn, akceptis funkciojn

en la esperantistaj entreprenoj, aranĝoj kaj unuiĝoj en Vieno. Kaj neniam li preterlasis okazon por perfektiĝi en la lingva scio; krom Esperanto li estis perfekta en la germana, hungara kaj franca lingvoj. Ni dankas al li multajn modelajn tradukojn el la mondliteraturo. Dum multaj jaroj li estis vicprezidanto fine honora prezidanto de la « Unua Esperanto-Unuiĝo » de la plej malnova Viena E-asocio kaj de la « E-organizo de Ofichavantoj de la komunumo Wien », estis estrarano en la iama Aŭstria-Esperanto-Ligo kaj en la komerca entrepreno Nova Tempo kaj poste fervora ideoriĉa delegito de la Aŭstria E-Delegitaro, kies plej grava akceliganto li fariĝis, kaj ree poste de la Aŭstria Esperanto-Asocio, la unua tutaŭstria neŭtrala organizaĵo. Kune kun sia amiko Glück li verkis la fame konatan lernolibron de Esperanto, laŭ kiu la plej multaj Esperantistoj en Aŭstrio lernis Esperanton. Plue li kunlaboris kiel redaktoro en la « Deutsch-Oesterreichischer Esperantist » kaj poste en la gazetoj « Nova Tempo » kaj « Aŭstria Esperantisto ». Li verkis artikolojn por multaj E-gazetoj; i.a. por « Heroldo » kaj « Internacia Medicina Revuo », kies Aŭstria redaktoro li estis. Estinte ankaŭ pasia ano de la Paneŭropa ideo, li fondis la Vienan grupon de la Paneŭropaj Esperantistoj. Estis li, kiu eldonis esperantlingve la Paneŭropan manifeston. Li estis delegito, kaj komitatano de U.E.A. Per tio arego da esperantistoj lernis ŝati lian homaman bonkorecon, la altajn kvalitojn de lia karaktero. Estinte unu el la unuaj esperantistoj li baldaŭ persone konatiĝis kun nla majstro Zamenhof kaj restis kun li en ĉiama amika kontakto. Vivante modesta kiel sanktulo, ĉiam lasante la unuajn lokojn al la ambicio de aliaj, li ludis en la Viena Esperanto-movado en la lastaj jaroj de sia vivo ĉefe la rolon de instiganto al perfekta lingvoscio, de edukanto al nobla homeco, de paciganto; en tio verŝajne li havis la plej valorajn sukcesojn. Ĉefe al li ni dankas la unuecon de la esperantistaj asocioj en Vieno kaj Aŭstrio. Kiom li estimis la pacon, tion montras ankaŭ lia amikeco kun la famaj gvidantoj de la pacomovado, kun Alfred H. Fried kaj Berta von Suttner, al kiuj li oftfoje liveris materialon kaj servis kiel peranto.

En nia memoro ĉiam restos tiu pasia poeziema fervora kaj fidela samideano, tiu modela homo, doktoro Edmundo Sós kaj en lian tombon ni postsendas nian koran dankon por lia pionira laboro. Li ripozu en paco !

(O. Z.).

Internacia Polica Ligo

Oficiala Informilo

Nia movado inter la policanaro antaŭenmarŝas! Post sukcesplena kurso inter la policistoj de Oslo, raportita lastnumere, ni ĝoje povas raporti hodiaŭ pri simila sukceso en Oocu, Japanujo. Sinjoro Tacuŝin el ĉi tiu urbo afable raportis al ni pri tio jene:

Esperantistoj en nia urbo oftege estis malhelpitaj pro erarkompreno de aliaj personoj ankaŭ inter la polico, kiuj konsideris Esperanton kiel danĝeran movadon. La movado pro tio ne progresis kaj ne sukcesis inter policistoj. Se la polico mem dubas pri Esperanto, tiam oni certe ne estas kuraĝigita propagandi ĝin inter policanoj. Necesis multaj penoj propagandi Esperanton inter tia dubema polico kaj esperantigi tiajn policanojn. La lokaj esperantistoj ofte eluzis okazojn, viziti policanojn kaj klarigi al ili la celon de Esperanto, sen ricevi interkonsenton iu ajn por eklerni la lingvon. Jam ŝajnis, ke policistoj en nia urbo neniam lernos Esperanton. Sed fine la penoj alportis disvolviĝon en Majo nunjare.

La fakestro de la ideopolico, sinjoro Sumikura aŭskultis mian konsilon por instrui Esperanton inter policanoj. Li eĉ entuziasmiĝis, informis la gubernatoron, sinjoron Jamaguĉi, estro de la gubernia afera fako, kaj trovis ankaŭ lian konsenton. La gubernatoro oficiale enketis, nomigi la policanojn, kiuj emas lerni Esperanton.

Jen la sukceso: 35 policanoj sin anoncis, kiuj partoprenis kurson en ĉambro de la gubernia oficejo.

La kurso nur daŭris de la 2-a ĝis la 29-a de majo ĉiuvespere de la 19-2a. Tiu mallongdaŭra kurso tamen tre bone finiĝis dank'al la helpoj de sinjoro Sumikura, kiu aranĝis ĉian necesan por la kurso.

Je la 29-a de Majo la kursanoj okazigis teokunsido en la sama loko. Tie dum interbabilada kaj interparolado diskuto fondiĝis grupo nomata «Marda Grupo», kiu kunvenas ĉiumarde vespere.

Tutspeciala sukceso estis atingita per tio, ke la gubernatoro mem partoprenis la kurson. Per tio la movado en Oocu ricevis fortegan impulson al plua esperplena kreskado.

Ni ne povas preterlasi la bonan okazon, esprimi al sinjoro Tacuŝin kaj al liaj favorantoj niajn tutkorajn gratulojn kaj prezenti al niaj novaj samideanoj samfakuloj respektplenajn salutojn.

Nia ligo esperas, ke ili ankaŭ baldaŭ plenumu plian devon de solidareco, aliĝi al nia ligo, por pli kaj pli progresigi la celon, nur atingebla en komuna kaj harmoniplena laboro!

La bildo prezentas la kursanojn, meze de la instruisto sinjoro Tacuŝin kaj de sinjoro Sumikura.

A. Pohle,
Liga redaktoro

Du jaroj sub la verda stelo

Lektoro Henrik Seppik, la estona propagandisto reiris de sia agadkampo en Svedlando por militservi en Estonio. Mankas al la movado, dum tuta jaro la fortoj de tre aktiva laboranto. La esperantistaro, facile forgesas la servojn de siaj gvidantoj, kiam la gazetara bruo pri ili silentiĝas.

Ĝistede legis la esperantistaro pri Ĉe-metodaj kurssukcesoj, kaj tial ne necesas skribi pri la meritoj de s-ro Seppik kiel Ĉe-metoda instruisto. Parolu la ciferoj mem: 53 Ĉe-kursoj kun kune 2015 partoprenintoj, 31 provlecionoj, 4 radioparoladoj, 65 prelegoj pri Estonio antaŭ ĉ. 6500 personoj. Sed lian ageman karakteron ne kontentigis la nura kursa laboro. Kie malnovaj esperantokluboj ekzistis, li plivigligis la kluban vivon, kie ne ekzistis li fondis novajn. Tiamaniere lia eksterkursa laboro fariĝis eĉ pli signifplena ol la kursa. Speciale li pli ol iu alia sukcesis interesigi la instruistojn kaj la lernejajn estrarojn. Ekz. en Kiruna oni tiun ĉi jaron aŭtune oficiale enkondukos-Esperanton rezulte de lia laboro kaj sukceso konvinkigi kaj esperantistigi la tiean popollernejan inspektoron.

Kunfondinto de la Esperanta Turista Komisiono li dum sia tuta kursado celis al ĝia progreso, farante reklamon pri ĝia agado en ĉiuj urboj, kiujn li vizitis, kaj instigante siajn lernintojn pere de la malkaraj vojaĝoj de E.T.K. elutiligi sian konon pri la mondlingvo. Jam en la jaro 1929 li en Estonio majstre organizis la akcepton de la unuaj svedaj esperantistoj-turistoj, kaj poste per modela laboro li tiel en Svedlando per korespondado kiel en Estonio per persona interveno organizis la turismajn aferojn. Laŭ eldiro de la prezidanto en la Kunlabora komitato de la Estonaj esperanto-asocioj *E.T.K. nun estas la plej bone gvidata turista unuiĝo de la lando* kaj plejgrandparte ĝi meritas tiun laŭdon al la nelacigebla laboro de Seppik.

Seppik estas viro de la silenta, flamante fajro. Unu el tiuj, kiuj mem pelataj, pelas nian movadon al ĝia celo. Tial en la ĝis-la-revidomomento honoron kaj dankon al la fidela laboranto, al la soldato irinta sed revenonta, al la ĉefo venonta. (Laŭ G. A.).

Korespondado

Interŝanĝo de objektoj.

Alblasserdam (Nederlando). — S-ro J. van der Rhee, F. 68, PI. kĉl.

Amsterdam (Nederlando). — S-ro N. A. Zilver, Damrak 95, (H. & P.) nur PM. (Malrespondas bagatelaĵojn).

Badalona (Hispan.). — S-ro Joan Fabregas, str. Arnus 61, 3-1-2a, PI. kĉl.

Bad Schlag 137 (Ĉeĥoslov.). — S-ro Fredy Stolze, seruristo, pri seruristа fako dum la nuna krizo. Certe respondos.

Berlin N. W. 87. — F-ino Amalie Menzel, instruistino, Unionstrasse 6-7 L. PI. k.ĉ.l.

Brüx (Ĉeĥoslov.). — S-ro Stephan Wabra, Ringstr. 875, PI. k.ĉ.l.

Den Haag (Nederlando). — S-ro Frits Belinfante, Banstraat 22, studanto de fiziko, amatorfotografanto, PI. L., kun Afriko, Azio en-oceanaj insuloj, pri vivmaniero, pejzaĝoj, moroj k.t.p.

Den Haag (Nederlando). — S-ro Ernst Belinfante, studento, Banstraat 22, L., PI., k.ĉ.l.

Erfurt (German.). — S-ro Walter Weber, Kirchbachstrasse 22, L., kun anoj de la New Thought movado en Ameriko kaj de la Gandhi movado en Hindujo. Estas ano de la germana novspirita movado.

Friedland Bez. Breslau (German.). — S-ro Heinz Bense, Del. de UEA, Flurstrasse 3, PI., L., ankaŭ kun F-inoj. PM. k.ĉ.l. Resp. certigata.

Gävle (Sved.). — S-ro Hermann Stahre, S. Kungsgatan 30, PI. L. prefere kun francinoj.

Grossröhrsdorf Sa. (German.). — S-ro Bernhard Schöne, Prasserstrasse 370 G. L. PI. k.ĉ.l.

Ivry-sur-Seine (Francujo). — S-ro Buisson, Del. de UEA, Colonie Alexandre 15 nur PM. kaj L. kun Eŭropo.

Kiskőrös (Hungar.). — S-ro Aleksandro Szalay, PI, Bfl., PM. kĉl. (PI nur komunumaj konstruaĵoj).

Lierre (belg.). — S-ro Emile Wuyts, rue St. Hubert 3. L. PI. kĉl.

Mala Bela (Ĉeĥoslov. poŝto Bakov n.J.). — S-ro Stanislav Moc, 19 jara PI, kĉl. prefere kun gejunuloj. Nepre resp.

Marshfield (USA, Oregon). — S-ro Alton Rogers, instruisto, L. pri politiko, belartoj. Certe resp.

Montbéliard (France). — S-roj Robert kaj René Thom, 11 kaj 8 jaraĝaj, 21 rue de Belfort, PI. bfl. kun samaĝuloj.

Mosonc (Hungar.). — S-ro L. Bergl, Fő utca 95, L. PI. kĉl.

Narrogin (West. Australia). — S-ro L. Illingworth, P.O. Box 21, MP. 100-250 uzitajn kun Norvegio, Turkio, Bulgario, Danzig kaj ekster Eŭropo.

Neuchatel S. (Svis.). — S-ro Emmanuel Zürcher, L. PI. kun lertuloj en lingvoj Esperanto, franca germana pri naciaj sentoj naciaj kutimoj, naciaj institucioj.

Nukerke ap. Etichove (Belg.). — S-ro Gabriel Claus, oficisto, PK. L. kĉl. ankaŭ kun skoltoj ĉiulandaj.

Oviedo (Hispan.). — S-ro Victor Lopez, T. Economicoz 2, PK. PM. L.

Paris 2. — S-ro L. Macké, 124, rue Réaumur, serĉas korespondantojn ĉiulandajn por 40 gelernantoj ĉiuaĝaj. Respondo certigata.

Podebrady-Cholanky (Ĉeĥoslov.). — S-ro V. Urbanek, gimnaziano, PI. L., kun gestudentoj ekster-eŭropaj.

Rio de Janeiro (Brazilo). — S-ro Fernando Montenegro, Caixa Postal 1766 PM novaj kaj novajoj (aerpoŝto) kun ĉiuj landoj speciale kun kolonioj francaj, anglaj, italaj, nederlandaj, portugalaj.

Tojama-Ken (Japan). — S-ro Kitanihon-Hioronŝa, Enami-maĉi, pri erotikaj temoj. Interŝanĝas ilustr. gazetojn.

Tokio (Japan). — S-ro Sei Wakamatsu, 1-2 Kamezawa-cho, Honjo-Ku ĉiunaciajn gazetojn kontraŭ malnovaj japanaj esp. gaz.

Viipuri (Finnlando). — F-ino Toini Tolvanen, Pellervonk. 19. PI, L. kaj fotografaĵoj.

Zampach p. Zamberk (Ĉeĥoslovakio). — S-ro Josef Hrabacek, lernejestro PI. L. pri ĉiuj temoj precipe lernejo, naturo (speciale fungoj), libro, kĉl.

Petoj kaj Proponoj

INTERNACIA KOMERCO

Adresŝanĝo. — La adreso de S-ro T. A. Glover nun estas : The Nook, Manor Way, Petts Wood, Orpington, (Anglujo, Kent).

Alkoholaĵoj. — Nova esperantisto Kosta I. Kostov — Komercisto de alkoholtrinkaĵoj — gara Straldĝa (Jambolsko). Bulgario, deziras havi rilatojn kun gesamideanoj, specialistoj pri fabrikado de anizbrando, konjako vermuto kaj ĉiaj likoroj.
Kiel rekompencon mi sendos belan, surprizan donacon el Bulgarujo.

Atentu foto-amatoroj. — Mi deziras interŝanĝi amatorajn fotografaĵojn, prefere de pejzaĝoj, infanoj, plantoj kaj bestoj. Mi ankaŭ posedas multajn Parizajn stereoskop-fotojn. Hermann Kuhnt, lingvo-instruisto, Breslau 16, Damaschkestr. 47 Germanujo.

Ĉu estas la kapitalo ? — Bonvolu vin turni al S-ro Walther Petzold, 1 Hindenburgstr. Schleiz, Germanujo, Thüringen.

Fotografistoj. — Profesiuloj kaj amatoroj ! Samideanoj el ĉiuj landoj, okupiĝantaj pri la fotografarto, estas petataj en afero ilin interesanta, sendi tuj siajn adresojn al Wlodzimierz Pfeiffer, Delegito de UEA, Ksiegarnia Fiszera, Lodz, Pollando.

Helpemaj Samideanoj ! — Mi kolektas por Esperanto-Ekspozicioj en mia Regiono kaj Provinco ĉiajn specimenojn de ĵurnaloj, gazetoj, gvidlibroj, ŝlosiletoj, reklamiloj, ekspoziciaj gvidlibroj, afiŝoj, ilustritaj kartoj (poŝtmarkoj bildflanke mi petas), ne pln vendeblaj lernolibroj, k.t.p. Pro senlaboreco vi alsendu senpage ! Sendu ĉion al S-ro J. van der Rhee en *Ablasserdam* F 68 (Nederlando)

Insignoj. — Insignojn de Societoj de ekskursistoj aŭ skiistoj, deziras interŝanĝi. S-ro S. Alberich-Jofré, str. Campo, 45, Barcelona (Katalunujo-Hispanujo).

Letervespero. — Esperantista grupo en Duisburg, p. A. S-ro Hans Klein, Blücherstr. 41, aranĝos ekspozicion kun letervesperoj, Sendu esperantaĵojn, kartsalutojn, leterojn. PM bfl. Certe respondos.

Literatura Mondo. — *Kiu povas sendi* al ni la numerojn 1, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 11, 12 de Literatura Mondo (4a jaro. 1925-1926), bonvolu proponi kondiĉojn pri aĉeto aŭ interŝango, al Belga Esperanto-Instituto, 11 Kleine Hondstraat, Antverpeno (Belgujo).

Skoltojn atentigu. — Ke ili lernu Esperanton, korespondu kun ni esperante, uzu dum vojaĝoj, tendaroj Esperanton ! Ni invitas ilin al ni ! Hungara Skolta Esperanto-Rondo, Budapest, V., Nagy Sandor-utca 6. (Oficiala ĉemiz-insigno de esp. tendaro kun hungara skolta revuo, enhavante esp. tekstojn : 3 resp. kup.).

Poŝtkartoj. — Por kompletigi mondkolekton (uzota propagandcele), mi deziras PI (PM bildflanke) el ĉiuj landoj esceptinte la jenajn, Anglujo, Argentino, Aŭstralio, Belglando, Bulgarujo, Bolivio: Ĉeĥoslovakujo, Ĉilio, Egiptujo, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Jugoslavujo, Japanlando, Kolumbio, Kubo, Latvolando, Meksiko, Nederlando, Polujo, Rumanujo, Svislando, Skotlando, Svedlando, Turkujo, Soviet-Ruslando, kaj Usono.
Kompense, mi promesas sendi al ĉiu sendinto senescepte vidaĵon el mia urbo — sed skribu legeble ! Wm. H. King, VD., Postal Division, Secretary's Office, G.P.O., Wellington, Nov-Zelando.

Mondvojaĝo Scherer

Post kelka klopodado mi sukcesis instigi la tiean « Meti-Unio, R.S. unio por popolklerigo », inviti s-ron Scherer por fari germanlingvan paroladon pri siaj travivaĵoj en Ekstrema oriento (20. X.). S-ro Scherer antaŭvideble havos ĉirkaŭ 800 aŭskultantojn, grandparte indiferentuloj aŭ eĉ kontraŭuloj de Esperanto. Por klare montri la sinsekvon de la mondvojaĝo kaj ĝian efikon mi intencas fari *ekspozicion* de la naci- kaj Esperantlingvaj *gazetraportoj*.

Mi do petas la delegitojn de la diversaj urboj pri *alsendo de tiaj raportoj pri Scherer-mondvojaĝo*. Mi estus tre dankema pro multflanka plenumo de mia peto, ĉar ju pli ampleksa estos la ekspozicio, ju pli malsamaj estas la lingvoj en kiuj oni raportis pri la mondvojaĝanto, des pli daŭra estos la efiko.

Se la ekspozicio estos kompleta laŭ la landoj vizitataj de Scherer, sendu kaj per tio helpu al nia kara lingvo ! Korc dankante mi sendas samideanajn salutojn al ĉiuj sendontoj.

Erich HÖLSCHER,
Delegito de UEA.

Freiberg (Sa.), Sachsenhofstr. 10.

GRANDAN KAPITALON

por malgranda enpago vi povas akiri per la 200-a Saksa Ŝtata loterio. La nesupereble favora ludplano enhavas gajnotaĵojn de 750 000, 500 000, 250 000, 200 000, 150 000, 100 000 germanaj markoj, krome tre multajn mezgrandajn.

Preskaŭ la duono de la lotoj gajnos

1/10	1/5	1/2	1/1	loto kostas
5.—	10.-	25.-	50.-	Germ. Mark.

Mendu tuj. Ĉio estos sendata en fermita koverto sen surpresaĵo.

Alwin PENTHER, kasisto de la Ŝtata loterio, membro de UEA, Innere Weberstr. 2, Zittaŭ (Sa.)

Gajaj Horoj

Spritaĵoj, anekdotoj, ŝerodemandoj,

preseraroj vortludoj.

RM 0,50 (sfr. 0,60) aŭ 2 respondkup.

Gajaj Vesperoj

Decaj bonhumoraĵoj.
Konsiloj por gajaj grupkunvenoj kaj kursoj.
Multaj esperantaj ludoj.
RM 1.— (sfr. 1,25) aŭ 4 respondkup.

La bonhumoraĵoj amuzas ĉiun esperantiston.

Grupoj, kies anoj uzas la libron : « Gajaj Vesperoj » (kaj ankaŭ la libreton : « Gajaj Horoj ») aranĝos gajajn, sed tamen tre instruajn vesperojn. La grupanoj restos fidelaj. Same partoprenantoj de progresintaj kursoj lernos kun plezuro.
Prezoj kun afranko. Respondkuponoj estas aĉeteblaj en ĉiu poŝtejo.

Mendu ĉe : C. Walter, Berlin W 10, Hohenzollernstr. 11 (Germ.) Poŝtĉeko : Berlin 85766.

Abonu je
LA ESPERANTA GAZETO
ĝi donas ĉiujn novaĵojn el internacia vidpunkto.
Aperas semajne.
4 numeroj 40 cendoj nederlandaj
J. TENSEN
Uithoornstraat 16, Amsterdam-Zuid, Nederlando.

Ekde Januaro 1930 aperas
UŜE - EĤO
la trimonata gazeto
Provekzempleroj haveblaj ĉe « LIBRO »
Strada Lonovici 1, Timiŝoara, Rumanio, Banato.

Aliĝu senprokraste al la 10.-a **jubilea** eldono de
BES-ADRESARO
de esperantistoj el ĉiuj landoj !

kiu celas kolekti adresojn de ĉiuj esperantistoj kaj de ĉiuj E-entreprenoj ! — Simpla aliĝo 0,50 Fr sv. (2 respondkup.), kun adresaro 1.— Fr. sv. — Publikigo de l' portreto 0,50 Fr. sv., anonca paĝo 25 Fr. sv. — Detala prospekto senpage. — Naŭa eldono el 1931 ankoraŭ ricevebla po 1 Fr. sv.

Eldonanto : BES (Boh. E.-Servo) Potŝtejn, Ĉeĥosl., Eŭropo.

Curso Elementar de Esperanto
(3e Milo)
SALDANHA CARREIRA e LUZO BEMALDO
Prezo : Eskudoj 12.— aŭ samvalora mono (2.75 Frk. svis.).
Liveranto : **Parceria Antonio Maria Pereira,** Rua Augusta, LISBOA (Portugal).

LA DOGMARO PRI LA VIVO
EMANUEL SWEDENBORG
Petu senpagan ekzempleron ĉe
SWEDENBORG SOCIETY (Inc.)
20 Hart Street, London, W.C.1.,
60 paĝoj, broŝuritaj. **Anglujo.** *Citu ĉi tiun gazeton.*

Ĉiu serioza, konstanta korespondemulo devas nepre havigi al si la plej novan, okaze de la XXIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Kraków eldonitan
ADRESLIBRON DE POLLANDAJ ESPERANTISTOJ
kiu, sur 224 paĝoj enhavas : a) adresojn de ĉiuj esperanto-societoj, grupoj kaj rondoj de Pollando, b) adresojn de 4.060 samlandanoj de nia Majstro kun tre detalaj indikoj : 1) laŭ-faka (172 profesioj, 2) laŭ-idea (24 ideaj tendencoj), 3) laŭ-korespondema (121 temoj pri korespondado), 4) 23 aliaj grupiĝoj, ĉio esperant-lingve presita.

Por Pollandanoj la libro enhavas krom tio ĝis nun nenie en tia formo ekzistantan apartan broŝuron « Praktika Informilo Pri-Esperanta », kiu estas vera malgranda Enciklopedio pri Esperanto kaj esp. movado por ĉiuj simpatiuloj, komencantoj kaj progresintoj.

Prezo : eksterlande 3.— sv. fr., en Pollando 4.— zl. plus 10 % afranko.

Mendebla ĉe la Libroservo de UEA aŭ senpere ĉe la eldoninto : **Jan ZAWADA, Warszawa,** M. O. Czerniaków, ul. Zaciszna 2. Pola Poŝt-ĉek-konto 20845.

L'Imprimeur-Editeur : Albert Granchamp, Annemasse. — 645-9-31.

KUL